

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA



**Poento
por la vivo**

PETICIO POR LA RAJTOJ DE LA VENONTAJ GENERACIOJ

Subskriboj sendotaj antaŭ septembro 1994


La troloĝateco kaj la senbrideco de la homaj aktivadoj estigas teruran minacon por niaj posteuloj.

La Deklaro pri homaj rajtoj, kiu proklamas ĉies liberecon kaj egalecon, estas ducentjara. Tiu ĉi belega teksto ne plu sufiĉas.

Ni postulas, ke estu solene deklaritaj la rajtoj de la venontaj generacioj, por ke ĉiuj homoj heredu neinfektitan planedon, kie ĉia formo de vivo povos disvolviĝi.



Jacques-Yves Cousteau



Jean-Michel Cousteau

Subskribante la peticion de la Skipo Cousteau, mi petas la ŝtatestrojn de la tuta mondo uzi sian influon por ke la Unuiĝintaj Nacioj kalkulu kun la rajtoj de la venontaj generacioj.

NOMO (en majuskloj)

ADRESO

SUBSKRIBO

Por Eŭropo kaj Afriko, bonvolu resendi la peticion al :
 Equipe Cousteau - Pétition
 75809 Paris Cedex 17
 France

Por Amerikoj, Azio kaj Oceanio, bonvolu resendi la peticion al :
 The Cousteau Society - Petition
 870 Greenbrier Circle, Suite 402 - Chesapeake
 VA 233290 USA



Equipe Cousteau

Fotokopioj estas akceptitaj



The Cousteau Society

Monato

internacia magazino sendependa
por politiko, ekonomio kaj kulturo

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto □ legantoj en 75 landoj □ fondinto: Stefan Maul □ 14a jarkolekto □ aperas principe la 1an de ĉiu monato □ abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo ■ **eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33; poŝtĉekkonto Bruselo n-ro 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperantobond, Antwerpen □ valida anonctarifo: n-ro 6 □ kompostita kaj presita en la eldonejo □ por adresŝanĝoj nepre menciu la kodon kiu troviĝas dekstre sur la adreŝliĝo ■ **redaktoroj:** William Auld, Gerrit Berveling, Tim Carr, Mark Fettes, Marco Gazzetta, Evgeni Georgiev, Paul Gubbins, Andy E. Künzli, Girvan MacKay, Stefan Maul, Seán Osborne, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Krys Ungar, Guido van Damme, Jean-Pierre VandenDaele □ 150 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj ■ aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj) □ represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto □ kopi-rajto ĉe la eldonejo □ ne sendu registritajn leterojn □ ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj; mendu ĝin pagante 20 NLG al UEA, konto NO-RA-F □ *verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen □ la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.



„La troloĝateco kaj la senbrideco de la homaj aktivadoj estigas teruran minacon por niaj posteuloj. La Deklaro pri Homaj Rajtoj, kiu proklamas ĉies liberecon kaj egalecon, estas ducentjara. Tiu ĉi belega teksto ne plu sufiĉas. Ni postulas, ke estu solene deklaritaj la rajtoj de la venontaj generacioj, por ke ĉiuj homoj heredu neinfektitan planedon, kie ĉia formo de vivo povos disvolviĝi.”

Tiel komenciĝas alvoko de la Skipo Cousteau, grupo kies celo estas provi protekti nian planedon pri venonta ekologia ĝenerala katastrofo.

La fondinto de la skipo, la fame konata Jacques - Yves Cousteau [Ĵak-Iv Kustó] (vidu foton) famiĝis inter alie pro la esplorado de la maroj en sia submara ŝipo „Calypso”. La homoj de l' Skipo Cousteau petas ankaŭ vian



helpon, la helpon de la esperantlingva komunumo, por akiri kiel eble plej multajn subskribojn favore al la deklaro de la rajtoj de la venontaj generacioj. SAT-Amikaro estis la unua por apogi la peton de la Skipo Cousteau kaj komencis disvastigi la esperantlingvan version de la peticiformularo, kiun vi trovas sur la apuda paĝo.

MONATO decidis kune kun SAT teni la torĉon kaj helpi al la dissendado de la peticio. Mediprotektado por MONATO ja ĉiam estis multe pli ol nura vorto en ĝisdataj vortaroj. Protektado de l' naturo estu daŭre en la fokuso de ĉies atento, ĝi estu parto de ĉies ĉiutaga rutino. Pro tio MONATO sugestas al vi fotokopii la apudan peticion kaj varbi subskribojn por ĝi. Se ne eblas fari fotokopiojn en via regiono, vi povas ricevi de Flandra Esperanto-Ligo (adreson vi trovos en la apuda kadro) kopion kontraŭ unu internacia respondkuponon, aŭ 10 kopiojn kontraŭ tri tiaj kuponoj.

Tiuj inter vi, kiuj jam trafolumis tiun ĉi numeron, eble nun intencas skribi al la rubriko „Leteroj” kaj protesti ke ĝuste en tiu ĉi eldono de MONATO mankas la rubriko „Medio”. Nu, la redaktoro Tim Carr havas tre validan pretekston por ne esti liverinta manuskriptojn. Iuj nekonatoj ŝteleniris lian loĝejon kaj renversis pli malpli la tuton, tiel ke Tim havis nun zorgojn pli gravajn ol sia rubriko. MONATO deziras al li kuraĝon kaj esperas kune kun la legantoj rerenkonti la medio-paĝon en la venonta numero.

Enhavo

Noticoj	4
El mia vidpunkto	5
Leteroj	6
Politiko	8
Moderna vivo	11
Ekonomio	14
Scienco	16
Turismo	17
Lingvo	18
Libroj	20
Novelo	21
Eseo	22
Arto	25
Spirita vivo	26
Hobio	27
Enigmoj	29
Humuro	30

Bonan apetiton!

Sinjoro Xie, el Ŝanhajo, Ĉinio, manĝas ĉion ajn. Antaŭ publiko li manĝis du razilo-klingojn, ferajn najlojn, ampolon, bierbotelon kaj okulvitrojn transdonitajn al li de spektanto. Li diris, ke tiaĵojn li komencis manĝi antaŭ ĉ. 10 jaroj. Manĝinte, li fartas pli bone; li suferas, se li ne tiom tiel konsumas. Laŭ Xie, kiu jam glutis ĉirkaŭ dekmil razilo-klingojn, nur parto de la manĝaĵo digestiĝas. Pliajn planojn li havas por vori magnetofonon kaj aŭtobuson.

Tan DEHONG

Elektronika prononc-vortaro

La universitato de Edinburgo, Skotlando, kunordigas komputilan projekton por ebligi al parolantoj de la naŭ oficialaj lingvoj de la Eŭropa Komunumo senerare prononci familiajn, urbajn kaj aliajn nomojn. Post du jaroj aperos kompakt-diskoj por ĉiu lingvo surhavantaj po miliono da nomoj, kune kun prononc-indikoj, etimologiaj notoj kaj informo pri eventualaj regionaj aŭ lokaj ŝanĝoj. Oni esperas, ke aĉetos la diskojn komercaj entreprenoj ne dezirantaj ofendi eventualajn klientojn eksterlandajn per ĝena misprononco de firma aŭ familia nomo. La projekto, nomita Onomastica [Onomastika], laŭ la greka *onoma* (nomo), kostas 2,5 milionojn da britaj pundoj.

Paŭlo GUBBINS

Ĉina polico en Hongkongo

Du Interpol-oficeroj de Ĉinio ĉi-februare atingis Hongkongon por fari unu-jaran servon kiel interrilataj oficeroj en la teritorio, kiu revenos al ĉina regado en 1997.

Wang [Ŭang] Gang antaŭe laboris en la ŝtata Interpol-oficejo en Pekino dum lia helpanto, Wu Shaoming [Ŭu Ŝaŭming], estis membro de la Ĝuangdong-provinca Interpol-oficejo. Ambaŭ estas spertaj policanoj kaj en Honkongo ili havos sian oficejon en la sidejo de la Novaĵ-agentejo de Nova Ĉinio en Ĝoja Valo sur Hongkong-insulo. Censinio

Norda rizo-krizo?

Importi rizon el oriento povas ŝajni normala afero. Sed kion diri pri kontrabandado de tunoj da rizo trans Sundon, la markolon inter Svedio kaj Danio? La klarigo estas, ke dum Danio kiel EK-lando, starigis doganan muron kontraŭ varoj el Azio, Svedio ne havas tian doganon. Tial rizo estas unu el tre raraj manĝaĵoj kiuj kostas malpli en Svedio ol en Danio. sj

Rifuĝintoj el Rumanio

Dum pro ekonomiaj kialoj rumanoj – inter kiuj grandparte ciganoj – migras al prosperaj landoj, en Rumanion rifuĝis ĝenerale pro politikaj kialoj somalianoj, kurdoj kaj albanoj. 70 albanoj estos resendataj en Albanion ĉar tiu lando ne plu fifamas pro politikaj malfacilaĵoj. Oni taksas je 1000 la nombron de enmigrintoj. Ĉiuj restas en la ĉikaŭaĵo de Bukareŝto.

Nic. MACOVEI

Klerigado el eksterlando

Nun en Moskvo funkcias pli ol 250 kursoj, fakultatoj kaj kolegioj, malfermitaj surbaze aŭ kun helpo de eksterlandaj altlernejoj. Tamen, inter ili malmultaj estas memstaraj institucioj. La unua, oficiale rajtigita kolegio en Rusio iĝis usona „Turo-Kolegio”, kiu proponas aŭ proponos al gestudentoj programojn pri artoj, naturaj sciencoj, medicino k.a., sed ĉefe pri komercado. NikSt

Malario venkota?

Hispana medicina revuo komunikas ke finfine sciencaj esploristoj sukcesis evoluigi efikan vakcinon kontraŭ malario. Se ili pravas, tio estas bona novaĵo por loĝantoj kaj vizitantoj de tropikaj regionoj. Por ŝirmi sin kontraŭ la malsano oni ĝis nun devis sufiĉe regule gluti malbongustajn kuracilojn kiel profilakton. La malario-parasito tamen pli kaj pli iĝas rezista kontraŭ tiuj kuraciloj tiel ke oni daŭre devas serĉi novajn kontraŭilojn. La medikamentoj plejofte ankaŭ havas sufiĉe gravajn kromefikojn. Tial homoj kiuj loĝas en tropikaj regionoj ne multon profitas de ili. Vera vakcino do certe estas ege bonvena kaj signifos grandan paŝon antaŭen en la higiena problemaro de multaj triamondaj landoj. gvd

Antisemitismo

Laŭ la agentejo ITAR-TASS nur en du respublikoj de la eksa Sovetio – Moldavio kaj Ukrainio – oni ne rimarkis kreskon de antisemitismo post la sendependiĝo. En liaj ŝtatoj tiu tendenco socia estas klare videbla.

Araneo

Plej granda peticio

Spertuloj pri mondrekordoj konstatis, ke la plej granda peticio de l' mondo devenas el Litovio. En 1990 dum kvar monatoj estis kolektitaj 5 218 520 subskriboj en pluraj landoj postulantaj, ke tiama Sovetio agnosku sendependecon de Litovio.

Laimius STRAŽNICKAS



Finfine en la centro de Galicio (Okcidenta Ukrainio), en la urbo Lvovo, oni starigis monumenton al la plej elstara poeto ukraina, Taras Ŝevĉenko. Kial finfine? Ĉar la permeso por starigado havas centjaran historion. Iam studentoj de tiu antikva urbo decidis kaj kolektis monon por la monumento, sed tiama aŭstro-hungara registaro ne permesis komenci modlan laboron. Same kondukis la pola registaro en la jaroj 1920-30 kaj sekvinta bolŝevika reĝimo. Nur suvereneco de Ukraina Ŝtato realigis centjaran intencon de Lvovanoj kaj en centra parto de la urbo, apude de tiu loko, kie antaŭ ne longe staris Lenin, aperis statuo de la plej populara poeto. Modlis ĝin skulptistoj en Argentino. Poste ĝi vojaĝis mare al Germanio, de kie speciala aŭto veturigis la monumenton al ĝia destinloko.

La inaŭguro de la monumento iĝis granda urba kaj provinca festo.

Araneo

Polemiko pri poŝto

Inter la plej bonaj klientoj de poŝtoj en ĉiuj landoj de la loĝata tero sendube estas esperantistoj. Tiu homspeco, apenaŭ lerninte la alfabeton de lingvo internacia, tuj komencas amase dissendi ĉiuspecajn poŝtaĵojn al aliaj samideanoj en plej foraj landoj: leterojn, poŝtkartojn, bildkartojn, proprajn poemaretojn, memtrikitajn revuojn, ĉirku- lerojn, prospektojn, poŝtmarkojn (!), pamfletojn kun klaraj kaj logikaj argu- mentoj por plibonigo de Esperanto, ĉenleterojn por gajni rublojn, rezolu- cion kaj kontraŭrezoluciojn, invitojn al kongresoj kaj feriosemajnoj en plej belaj dezertoj... ktp., ktp.

Gajno de miliardoj

Bedaŭrinde ĝis nun neniu elkalkulis, kiom da miliardoj gajnis la poŝtservoj tutmonde ekde 1887 helpe de skrib- emaj Zamenhof-adeptoj – sed sendu- be Zamenhof meritis grandiozan oma- ĝon kaj premion de Universala Poŝta Unio, ĉar li havigis al ties ŝtatoj-mem- broj gigantan plusvaloron.

Sed kio fakte okazas? Kreskanta sub- premado kaj hontinda diskriminacio fare de poŝtoj kontraŭ esperantistoj. Ilia preferata kaj konvena uzado de poŝtaj servoj estas sendi ion ajn en ko- vertoj, precipe leterojn kaj presaĵojn, kaj poŝtkartojn. Tiun metodon de ko- munikado tamen la poŝtmastroj tut- monde rigardas kiel eksmodan, ĉar por plenumi la leteroservojn oni bezon- as homojn, kaj homa laboro kostas pli multe ol tekniko, aparatoj ĉiuspe- caj, kiujn oni unu fojon instalas kaj nen- iam plu devas pagi salajrojn, maŝinoj kaj aparatoj, kiuj ne malsaniĝas aŭ eĉ gravediĝas, ne libertempas, ne pos- tulas krompagon pro dumnokta labo- ro.

Mizera servo

Mi diras nenion novan al vi, estimataj gelegantoj, konstatante ke tutmonde la leteroservoj de la poŝto konsider- inde, parte draste malboniĝis, en kel- kaj okazoj reduktiĝis al espero ke iu letero iam ajn alvenos (kaj ofte tiu ĉie espero montriĝas pura iluzio). Jen sperto lastatempa: el 5 leteroj senditaj al ruslanda urbego 2 tute ne alvenis; letero sendita registriite vojaĝis de Aŭ- gsburgo ĝis tiu urbo ne malpli ol 3 se- majnojn kaj 2 tagojn! La (ordinara) le- tero de la adresito kun ricevokonfirmo vojaĝis 14 semajnojn (do pli ol 3 mona- tojn) ĝis Aŭgsburgo kaj alvenis sam-

tempe kun alia ordinara letero, ekspe- dita du monatojn post la unua. Supoz- eble la rajdantaj kurieroj de grafo Taxis [Taksis] en la 16a jarcento estis pli rapidaj. Ĉu eblas alia konkludo ol tiu, ke la poŝtoj volas devigi siajn kli- entojn transiri al aliaj komunikmeto- doj, precipe telefono kaj telefakso (per kiuj ili gajnas konsiderinde pli multan monon)?

Bone, do mi telekopiis: por kapti la te- lefaksnumeron de mia ruslanda amiko mi bezonis pli ol du horojn – sed fine jen la signalo! Kia ĝojo! La folio malra- pidege pasis tra la aparato; nu ja, estas longa distanco. Sur la ekraneto aperas konfirmo pri alveno – tamen, kiel mi eksciis tri monatojn poste, la te- leletero neniam atingis mian amikon... Ho, benita poŝttechniko!

Danĝeraj komunikiloj

Jus oni informas, ke la moderna tekni- ko havas ne sole avantaĝojn, sed an- kaŭ riskojn. La novaj germanaj port- eblaj telefonoj emisias ne nur vian me- saĝon, sed ankaŭ danĝerajn radiojn, kiuj malsanigas vian kapon kaj dama- ĝas viajn okullensojn.

Por peli siajn klientojn al la riskoj de tiuj modernaj komunikiloj, la poŝto konstante plikostigas kaj plikostigas la leteroservojn. Por realigi tiun ĉi celon, oni elpensas pli kaj pli ruzajn rime- dojn. Ekzemple la germana poŝto je la unua de aprilo (!) enkondukis grandan

reformon, kiun oni laŭdegas pro tio, ke ĝi simpligas la tarifstrukturon por la ordinaraj (legu: stultaj) homoj. Nun ek- zistas nur kvar diversaj leterspecoj kun respektiva afranko: ordinara por 1 marko, „kompakta” por 2 markoj, „granda” por 3 markoj kaj „maksimum- letero” por 4 markoj. Praktike kaj logi- ke, ĉu ne? Sed la alia flanko de la me- dalo: presaĵo nun estas letero. Send- ante presaĵon de 33 gramoj al Sud- Ameriko mi pagas ekzemple 4 mar- kojn anstataŭ 1.90 markojn antaŭe!

Nu, pli altaj tarifoj ne estas afero nur germana; demandu ruslandanon! Tie la tarifoj plialtiĝis dum la pasintaj mo- natoj je eble jam mil procentoj – kaj pro tio ja la leteroj nun rajtas vojaĝi tre longan tempon, por vere ĝui la belan novan mondon... En kelkaj landoj pro tio establiĝis privataj poŝtoj, kiuj ofer- tas servojn konsiderinde pli favorpre- ze. Sed tio ne eblas ĉie, ankaŭ ne en Germanio, kie la ŝtato havas poŝtmo- nopolon.

Ek al fina venko

Sed ni esperantistoj estas aparta premgrupo, kiam temas pri leterado. Tial nepre necesas, por savi Esperant- ujon el bankrotiĝo kaj garantii la finan- venkon, ke Universala Esperanto-Aso- cio tuj fariĝu membro de Universala Poŝta Unio kaj elbatalu proprajn Espe- ranto-tarifojn tutmonde. Aŭ eĉ pli bone: ni fondu nian propran poŝtser- von! Tiu ĉi Verda Poŝto tutmonde eks- pedu leterojn, presaĵojn kaj revuojn de esperantistoj fulmrapide kaj senpage. Imagu, kiom da homoj rapidege lernos la lingvon internacian, nur por ĝui ĉi tiun kostavantaĝon. Do ek al la fina venko helpe de la Verda Poŝto!

Stefan MAUL



Unuiĝinta Naciaro (1)

Mi pensas, ke estas neĝusta kaj senbezona kreado de „pure esperantaj” vortoj por anstataŭi universale funkciantaj kaj komprenatajn internaciajn vortojn. Sur esperanta gazetararo oni daŭre trovas ĉiujn novajn ekzemplojn de tiu „lingvokreado”. Ekzemple: „Unuiĝinta Naciaro” anstataŭ „Unuiĝintaj Nacioj”, „elcentoj” anstataŭ „procentoj” aŭ tiajn senbezonaĵojn strangaĵojn kiel „esperantistaro”-n. Esperanto estas la lingvo internacia kaj por esti bone komprenata kaj akceptata ne devas anstataŭi vortojn kiujn komprenas ĉiuj en la mondo per „pure esperantaj” sed apenaŭ komprenataj vortaĉoj. Marek Migurski, Pollando

Unuiĝinta Naciaro (2)

Ne kaj ne kaj ree ne! „UN” ne estas „Unuiĝinta Naciaro” kaj tio ne estas Esperanto! Dentaro ne estas simple dentoj, herbaro ne estas simple herboj, vagonaro ne estas simple vagonoj, ktp. analogie ankaŭ „naciaro” ne povas esti simple „nacioj”. Naciaro povas esti nur iu alianco aŭ speciala grupiĝo aŭ unuiĝo de nacioj. Alivorte, eble ĝuste la tutaĵo – nome la Unuiĝintaj Nacioj mem. Sekve, „Unuiĝinta Naciaro” estus mallogikaĵo. Por „UN” oni povas skribi la frazon „Unuiĝintaj Nacioj” aŭ „Naciaro”. Punkto! La avantaĝo de planita lingvo estas, ke ĝi konstruiĝas logike kaj sen esceptoj. Legante MONATOn, mi ĉiam pli ofte dubas, ke Esperanto ankoraŭ apartenas al tiu kategorio. La nombro da mallogikaĵoj, fuŝitaj vortkombinaĵoj kaj superfluaĵoj neologismoj kreskas de tago al tago. Tamen, kial mi maltrankviliĝu, mi denaske parolas la lingvon internacian – nome la Anglan.

Pejno Simono, Germanio

Unuiĝinta Naciaro (3)

Same kiel Eskil Svane (MONATO, 1993/3/ p. 6) mi opinias, ke esperantistoj devas sekvi la tradukon de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj aprobita de Universala Esperanto-Asocio kaj eldonita de la Oficejo de Publika Informado, Unuiĝintaj Nacioj, en Novjorko en 1979. Inter 1945 kaj 1970 oni uzis diversajn tradukojn. La pripensado kaj diskutado daŭris ĝis en 1970 kun la kunlaborado de Ivo Lapenna kaj Eskil Svane ni havis tekston ĝenerale akceptitan almenaŭ de juristoj kaj diplomatoj. En 1979 ĝi estis eldonita en kvanto de 20 000 ekzempleroj. Ekde tiam nur kelkaj individuoj, ekzemple nia kara forpasinta redaktoro de *UN kaj Ni*, sugestis ŝanĝojn. Spite de mia originala uzo de „Unuiĝinta Naci-

aro” mi petegas al ĉiuj (ankaŭ verkantoj kaj legantoj de MONATO) ne rekomenci la antikvan disputadon. Ni ne bezonas daŭran diskutadon pri malnovaj dokumentoj, sed aliajn tradukojn de fundamentaj internaciaj „dokumentoj de kunlaboro” (ekzemple: la traktato de Romo kaj la Deklaracio de Rio de Janeiro). Sub instigo de la nova Jurista Asocio mi jam faris kelkajn tradukojn kaj mi bonvenigas ĉiun aktivan kunlaboradon de kompetentuloj.

Ralph Harry, Aŭstralio

Unuiĝinta Naciaro (4)

Pri „Unuiĝinta Naciaro” mia opinio estas proksimume sams kiel pri „EES”. Unua-vide la termino estas alloga: ĝi estas neriproĉeble esperanteca kaj donas singularan nomon al io, kio estas evidente unuopa, t.e. la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj (OUN kiel ekvivalento de la franca ONU). Aliflanke, ekzistas almenaŭ du gravaj motivoj por eviti, eĉ anatemi, tiun singularan nomon. Unue, la titolo „Unuiĝintaj Nacioj” estas firme establita en Esperanto, kvazaŭ oficialiĝinta preskaŭ jam ĉe la ekesto de tiu organizaĵo: ni disponas ja pri zorge ellaborita esperanto teksto de la „Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj” kaj jam dum 40 jaroj multaj aŭtoritataj esperantistoj konstante tiel nomis ĝin. Due – kaj tie ĉi mi revenas al mia argumentado pri EEA anstataŭ EES – la titolo „Unuiĝintaj Nacioj” spegulas la formon en almenaŭ tiuj el la *oficialaj lingvoj* de UN, kiujn mi konas. Ni ne povas tute libere doni esperantaj nomojn al fenomenoj ekzistantaj en la mondo, sed devas laŭeble fidele esprimi en nia lingvo la enhavon de ties ekzistantaj titoloj. Tute alia afero estus, se iu kreus novan organizaĵon kaj volus nomi ĝin ekzemple „Unuiĝinta Esperantistaro” – sed estas interese, ke ŝajne nenie en Esperantio oni ĝis nun ekspluatis la eblecojn tiel uzi la ar-sufikson. Mi do konkludas, ke la formo „Unuiĝinta Naciaro” estas misnaskaĵo.

Brian Moon, Luksemburgo

N.d.l.r.: Ni opinias ke ĉi tie ni povas fermi la diskuton. Nia legantaro konvinkis nin pri la pli-taŭgeco de „Unuiĝintaj Nacioj”, do ni konsilos al ĉiuj niaj redaktoroj estonte nur uzi tiun formon. Se tamen, iam leganto trovos la „misnaskaĵon” ni petas al li ke li konsideros ĝin kiel nuran komposteraron!”

Longa vojo ĝis Koreio kaj Ukrainio

Mi laŭdas la kuraĝon ĝustigi, kiel en la antaŭvortoj de la redaktoro (MONATO,

1992/7, p. 3) „ni ĵus uzis la formon Ukrainio kaj ne plu Ukrainio kiel en la pasintaj numeroj... (...) siatempe jam decidis pri la uzo de Koreio anstataŭ la akademia Koreo” ja tri jarojn atendinte. Kiam en 1989 mi sendis mian kontribuaĵon kontraŭ MONATO, kiu honoris kaj deklaris „definitiva” la *Norma Landnomlisto*-n de la prezidanto de la Akademio de Esperanto, malgraŭ protestoj eĉ de multaj akademi-anoj mem, tiam la redaktoro mian aserton ne publikigis kaj uzadis la formojn Koreo kaj Ukrainio, Zairo... kontraŭajn de la multjara uzado de UEA kaj tiulandaj esperantistoj. Sed en la sama jaro 1989, de post sia decembra numero la magazino reuzis Koreio-n kvankam sen ia ajn rimarko pri tia reŝanĝiĝo. Mi admonis lian malsincer-ecan ĵurnalismen, ĉar la senrimarko daŭre konfuzis ĝiajn legantojn. La liston de la Akademio rifuzis la organo de UEA (*Esperanto*, 1989/7-8, p. 139) „La norma listo de landnomoj de la Akademio de Esperanto ... elvokas diversspecajn reagojn ... Tiu ĉi revuo ne tiom hastos (kiel *Monato*). Ni atendos viglan ... diskuton ... interalie la Landaj Asocioj en Koreio ... aŭdigos siajn protestojn (ĉe UK) ... malgraŭ ke je la konstitucio de UEA la oficiala lingvo de la Asocio estas Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia Fundamento, per la verkaro de sia instituto Zamenhof kaj per la ĝenerala lingvouzo kontrolita de la Akademio de Esperanto.” Ĉe la UK de Brajtono 1989, d-ro E.-D. Krause, la akademiano „responde al la fortaj protestoj de koreoj, ukrainoj kaj nov-zelandanoj aldonis, ke la Akademio rekonsideros sian decidon kaj eble anoncos alian rekomendon” (UK-raporto de *Heroldo de Esperanto*, 1989, sept. 10an) sed ankoraŭ atendita. Ĉe la 8a Oficiala Aldono de la Akademio de Esperanto 1968- 1974 estis metita la propono de 35 landnomoj de d-ro Albault ekster Parto Oficiala. S-ro Izumi Yukio tuj faris kontraŭ la akademia decido „demente ... averton pro la prestiĝo de la Akademio”, sur la *Revuo Orienta* 1989/4, la organo de Japana Esperanto-Instituto, sub la titolo „Longa vojo ĝis Koreio”. Ankoraŭ la Akademio survojas, ĝis kiam?

Ahn Song-san, Koreio

Landnoma mikspoto...

Abonanto de MONATO ekde 1985, mi atente sekvis la debaton pri la landnomoj. La eldono de la poŝkalendaro naskis novan liston de landnomoj, kiun mi trovis bona. Poste, en 1989, la Akademio de Esperanto prezentis


novan liston. Mi ankaŭ trovis tiun liston bona, kaj notis kun kontento ke la tiama redaktoro decidis en MONATO nur uzi normajn nomojn. Reage al tiu listo, la Korea Esperanto-Asocio avertis ke neniam ili rezignos pri la nomo Koreio. Egiptianoj ne reagis, sed multaj eŭropanoj opiniis ke Egiptio estas la nura esperanta nomo de la lando. Inter Ukraino kaj Ukrainio MONATO longe hezitis, sed finfine elektis Ukrainio-n. La nova redaktistaro decidis elekti la landnomon laŭ la uzo de propraj loĝantoj. Pro tio ni legas nun Zairion anstataŭ Zairon. Tamen, se oni konsideras la opinion de ĉiu nacio, oni alvenos al tia situacio de germanoj volas esti deŭĉoj en Deŭĉlando, hungaroj esti magjaroj en Magjarlando... Jam en la Jarlibro mi legis ke eburianoj nun nomas sian asocion „Kotdivoara Esperanto-Asocio"! Krome, pri multaj landoj, precipe en Afriko, regas granda ĥaoso. Oni trovas: Ĉado apud Ĉadio, Kameruno apud Kamerunio, Zairo apud Zairio... Kelkaj landoj havas saman nomon kiel sia ĉefurbo: Andoro, Ĝibutio, Gvatemalo, Kuvajto... Pri kelkaj oni diferencigas la landon disde la urbo: Luksemburgio, Meksikio, sed ne pri aliaj. Kelkaj landoj havas saman nomon kiel sia ĉefrivero: Gambio, Kongo, Niĝero, Senegalo... Same, nur pri unu oni diferencigas la landon disde la rivero: Zairio. Kelkaj landoj havas saman nomon kiel sia ĉefmonto: Kameruno, Kenjo, Togo... Nur pri du oni diferencigas la landon disde la monto: Kamerunio kaj Togolando. Kiel instruanto de Esperanto, mi ne plu povas elporti tiun situacion. Oni ne rajtas ŝanĝi senĉese la landnomojn. Oni akordiĝu definitive! Kiu ajn estos la adoptita listo, ĝi estos pli bona ol la nuna ĥaosa situacio.

Jean-Claude Caraco, Francio

Infano estas reĝo

Niaj geavoj havis puran teron; niaj gepatroj malpurigis ĝin per siaj militoj kaj sango-ondoj kaj per grava polucio. Hodiaŭ estas ni, la gejunuloj, kiuj devas purigi nian planedon por ke niaj infanoj povu vivi pace sur tero purigita de ĉiu polucio. Kompaton! Ne plu mortigu viajn infanojn ĉar ili estas pli multekostaj ol la tuta nuntempa ideologio. Patrinoj, ne plu ploru! Moŝtoj de tiu ĉi mondo, rigardu en kia stato estas nia mondo kaj nia vivo pro via cinika idealo. Prenu do infanon ĉe la mano, amu ĝin, kaj vi vidus ke ili estas la reĝoj de nia mondo!

Sébastien Conois, Francio



Kiel skotdevena leganto, mi ege interesiĝis pri la raporto laŭ kiu Skotlando nun etendiĝas ĝis la Balta Maro (MONATO, 1993/2, p. 15). Kvankam iom bizare, tiu okcidenta ekstremaĵo de Skotlando laŭŝajne restas samtempe sveda. Certe tiuj baltaj skotoj ĝuos pli da prospero ol tiuj, kiuj vivas sub londona registaro ne elektita de skotoj. Espereble la insula tradukista centro inkludos, inter la uzotaj lingvoj, ankaŭ la skotgaelan.

GMA

Kiel fartas eldonado?

Konsternis min la artikolo „Kiel fartas eldonado en Francio?” (MONATO, 1993/3, p. 26). Ĉu eblas ke eldonkvanto de literaturaj verkoj meza estas 4000 kaj maksimumo 10000 en lando kies loĝantaro estas pli ol 50 miliono, kaj kiu dum jarcentoj havis kaj havas gvidan rolon en la eŭropa kulturo? La granda nombro da titoloj signifas nenion. Ja ekde la tempo kiam ankaŭ Hungario komencis troti al fatamorgano de okcidentstila konsumsocio, niajn stratojn inundis la senvaloraj – eĉ nocaj – presproduktoj; privatigitaj ŝtataj librovendejoj estas transformitaj en butikojn, bilard-salonojn k.s. Tiu bela nova mondo estas ne favora al kulturo. Tamen la dekadenco komenciĝis jam antaŭ la reĝimŝanĝo. En la dua parto de nia jarcento ĉiaspeca arto tute forigis de la vasta publiko. En la pasinta jarcento kompreni bildon aŭ skulptaĵon ne bezonis specialan klercon. Ĉiu, kiu scipovis legi, senprobleme povis kompreni kaj eĉ ĝui poemojn, novelojn, romanojn... Nun, tio tute ne plu eblas. Sincere, signifan parton de la modernaj artaĵoj – inkluzive de esperantaĵoj – mi ne komprenas kaj ne povas ĝui. Ĉu mi estas ne sufiĉe klera aŭ inteligenta? Aŭ ĉu eble mi estas tro sincera? Ĉu eble mi kuraĝe krii: „Haltu, sinjoroj, la reĝo estas nuda?” La mondon minacas la plej diversaj danĝeroj. Ĉefa kialo estas la homaj aka-

paremo kaj egoismo, kiuj fontas el malklereco. Artistoj estu instruantoj: per kompreneblaj kaj ĝueblaj verkoj ili instruu homecon, komprenon, toleremon, modestecon... Nur tiam ili meritas la aprecon de estonteco, kiun sen pozitiva agado de intelektularo neniu povas ĝisvivi.

János Sárközi, Hungario

Koran dankon

Mi tre dankas al la redakcio pro aperigo de mia letero „Staru antaŭ ni” (MONATO, 1993/3, p. 7) kaj pro la instigon al abonhelpado. Ankoraŭ mi ne scias kiel reagos la karaj legantoj, sed mi ja daŭrigas miajn klopodojn konvinkigi homojn pri la damaĝoj de fumado.

Johano Károly, Hungario

(N.d.l.r.: Ni ĝojas ke ni povas informi al Johano ke bonvolemlulo sekurigis por li daŭran abonon (almenaŭ ĉi-jare) al MONATO.)

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:
FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MONATO (Leteroj)
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio

BELGIO

Federismo: kunvivi aparte

Post longa historio de interna kverelado inter la kvar milionoj da franc-lingvaj kaj ses milionoj da nederlandlingvaj belgoj, la belgaj politikistoj decidis, ke la plej bona maniero kunvivi estas tion fari aparte: Belgio iĝis federa ŝtato, kiel Svislando aŭ Germanio.

Ekde 1970, sed pli intense ekde 1988, Belgio progresive kaj intence ŝanĝiĝis el unuopa (centrita) al federa (malcentrita) ŝtatformo. En 1988, la registaro de Wilfried [Ŭilfrid] Martens, la tiama ĉefministro, prezentis tri etapojn, tute simple nomitajn fazojn unu ĝis tri de la ŝtatreformo. La 29an de septembro 1992, la registaro de Jean-Luc Dehaene [Ĵa-Luk Dehane], la posteulo de Martens, finfine interkonsentis pri la akordo de Sankta Miĥaelo, la tria kaj lasta fazo.

Por ke la propono iĝu leĝo, oni bezonas du trionojn de la voĉoj en la nacia parlamento. Tiucele, la registaro „aĉetis” la voĉojn de la ekologiismaj partioj, enkondukante medi-favoran imposton, la „eko-imposton”. La 6an de februaro 1993, la belga parlamento voĉdonis du trione favore, danke al du voĉoj. Tiel, Belgio oficiale nomiĝas federa.

Ŝtato, regiono, komunumo

La interkonsento tute ne estas simpla. Belgio estos dividita, kiel ĝi de kelkaj jaroj jam estas, en tri nivelojn de registara potenco: la ŝtatan, la regionan, kaj la komunuman. Kvantam ili teritorie interkovras unu la alian, ili ĉiuj havos siajn apartajn



Eks-ĉefministro Wilfried Martens

respondecojn. La ŝtata registaro regos pri tutlandaj aferoj, kiel defendo, enmigrado, iagrade transportado, kaj la plimulto da eksteraj rilatoj. La regionoj respondecos pri agrikulturo, la medio, iom da scienca esplorado, kaj ankaŭ eksteraj rilatoj kaj komerco. Fine, la komunumoj pritraktos kulturajn, edukadajn kaj lingvajn aferojn. Efektive, ĉi tiu tria fazo transdonas povojn de la ŝtata kaj komunumaj registaroj al la regionaj, kaj provizas elektitajn asembleojn por tiuj regionoj.

Antaŭe, deputitoj de la ŝtata parlamento aŭtomate havis ankaŭ seĝojn je la aliaj niveloj. Tiu ĉi sistemo, havi duoblajn kaskedojn aŭ interŝanĝi ĉapojn, finiĝos.

Unu lando, ses parlamentoj

Ŝtate, la parlamento estas dividita en du ĉambrojn: la ĉambron de reprezentantoj kaj la senaton. Ili ambaŭ asignas procentaĵojn da seĝoj por nederlandlingvanoj kaj por francilingvanoj.


Ekzistas ankaŭ tri regionaj registaroj: la Konsilantaro Regiona Valona, kiu respondecas pri la franc- kaj etaj germanlingvaj areoj de la lando krom la dulingva Bruselo; la Konsilantaro Regiona Brusela; kaj la Flandra Konsilantaro, kiu regos la nederlandlingvan areon krom Bruselo.

Laste, ekzistas tri komunumaj registaroj: la Konsilantaro de la Germanlingva Komunumo, kiu pritraktas aferojn de la tre malgranda germanlingva loĝantaro; la Konsilantaro de la Komunumo Francilingva; kaj denove la Flandra Konsilantaro. Je ĉi tiu (komunuma) nivelo, Bruselo estos reprezentata de 19 bruselanoj francilingvaj en la Konsilantaro de la Komunumo Francilingva, kaj ses nederlandlingvaj bruselanoj en la Flandra Konsilantaro. Ĉar la flandroj kunigis siajn komunumajn kaj regionajn asembleojn en unusolan parlamenton, la Flandran Konsilantaron, Belgio entenas entute ses, kaj ne sep, apartajn parlamentojn.

Ankaŭ la francilingvaj regiona kaj komunuma parlamentoj povas kuniĝi laŭŝate, sed oni ankoraŭ ne tion faris. Cetere, ekzistas nesimpla sistemo per kiu la diversaj ĉambroj elektos membrojn de la aliaj.

Diversaj ŝanĝoj

Ne nur parlamentaj ŝanĝiĝoj okazis. La Belga Konstitucio, kiu datumas de 1831 kaj komenciĝas per la vortoj, „Belgio estas dividita en provincoj...” ŝanĝiĝas al „Belgio estas fe-



Nuna ĉefministro Jean-Luc Dehaene

dera ŝtato...”. Plue, Brabanto, la nura dulingva, valon-flandra provinco estos disigita en du provincojn, Flandran Brabanton kaj Brabanton Valonan. Bruselo, nuntempe parto de Brabanto, apartenos al neniu provinco. Sed, la Konsilantaro Regiona Brusela ricevos provincajn, tamen negravajn, povojn.

Pri la Eŭropa Komunumo (EK), la flandroj gajnis unu seĝon en la Eŭropa Parlamento (EP) en Strasburgo, koste de la francilingvanoj. Flandroj nun havas 14 el la 24 belgaj seĝoj, kaj oni promesis al la germanlingvanoj, ke ili ricevos seĝon, se oni iam donos al Belgio aldonan.

Feliĉe, ne la tuto plikomplikiĝis. Ŝtate, oni ne plu rajtas havi pli ol 15 ministroj en la ministraro. Por stabiligi la registarŝanĝadon, la parlamento estos devigata proponi novan ĉefministron al la reĝo kiam registaro falas pro voĉdono de nefido. Nuntempe tio ne okazas, provokante longajn periodojn de interdiskuto antaŭ ol oni trovas novan ĉefministron.

Estonteco neklara

Certe, tiu nova sistemo ne estas simpla, sed la politikistoj havas kialojn por sia agmaniero. Por kelkaj, ĉi tiu estas la fino de la laboro. Por aliaj la interkonsento signifas nur etapon celantan ankoraŭ pluan federigadon. La apenaŭeco de la plimulto, kaj la neceso „aĉeti” voĉojn, indikas ke la afero ne estas sendisputa. Ĉu ĉi tiu akordo garantias la unuecon de Belgio, aŭ ĉu ĝi signifas, kiel la nederlanda televido diris, ke restas nur unu sola belgo... la reĝo?

Marko P. MAERTENS

Eksterlandanoj kaj dekstremuloj

En januaro okazis en Vieno la plej granda demonstracio ekde 1945: „Luma Maro”. Almenaŭ 200 000 aŭstroj demonstraciis en la urbocentro kontraŭ malamo al fremduloj. Nenie estis tumultoj, eĉ policistoj tenis kandelojn en la manoj. Multaj organizaĵoj subtenis la pacajn marŝantojn: de la eklezio ĝis la sindikato. La emerita ĉefepiskopo diris, ke oni konstruu pontojn kaj rigardu al la estonteco, kvankam oni ne miksu religiajn principojn kaj politikajn vidpunktojn.

Tiu evento estis reago al tutpopola postulo (iniciatita de la dekstrema Liberala Partio LP), kiu subskribeblis dum la semajno post tiu demonstracio.

Tiu postulo havis la nomon „Aŭstrio Unue” kaj konsistis el 12 punktoj:

1. Laŭkonstitucie Aŭstrio ne estu „enmigra lando”;
2. Nenia enmigro ĝis solvo de la loĝeja problemo kaj malaltigo de la senlaboreco al 5%;
3. Devo por eksterlandaj laboristoj porti legitimilon je la laborejo kiel pruvo ke ekzistas laborlicenco kaj asekuro;
4. Pli da policistoj, pli bonaj salajroj por la polico; precipe por kontraŭba-

tali la organizitan krimon;

5. Estigo de limprotektita trupo;
 6. Maksimume 30 % da eksterlandanoj en lernejoj; se estas pli ol 30% – aranĝo de specialaj klasoj por tiuj;
 7. Sufiĉa kono de la germana estu kondiĉo por vizito de lernejo;
 8. Nenia balot-rajto por eksterlandanoj;
 9. Nenia antaŭtempa aljuĝo de la aŭstra civitaneco;
 10. Efikaj paŝoj kontraŭ nelaŭleĝaj poreksterlandanaj kluboj;
 11. Tuja ekzilo de eksterlandanaj krimuloj;
 12. Stigo de por-orient-eŭropa fondaĵo por malhelpi migradojn.
- Tiun postulon subskribis nur 417 000 aŭstroj, t.e. 7,4 % de la rajtigitoj. La estro de la LP, Jörg Haider [Jerg Hajder] estis malkontenta pro tiu rezulto; li deziris la duoblon. Laŭ li tiuj magraj nombroj estus la sekvo de publika premo kontraŭ „kuraĝaj subskribemaj aŭstroj kaj totala malaprobado de la postulo fare de la amaskomunikiloj”.

Reprezentantoj de la reganta koalicio atentigis, ke kelkaj punktoj de la postulo estas jam realigitaj.

Walter KLAG

Ne la baltoj kulpas!

La artikolo „Neanoncita milito” de iu sekreta B.N. en MONATO (1992/12, p. 8) estas bona ekzemplo de demagogio, falsado, mensogo kaj malkompetenteco. Eĉ pli, ni estonoj, latvoj kaj litovoj rekonas ĉi tie la al ni tre konatan „manskribon” de la fifama KGB. Ĉio estas miksitita ĉi tie: iom da kritiko de stalinismo, iom da duonvero, sed multe da rekta falsado. La tendenco kaj celo estas bone videblaj – nigrigi konkrete la latvojn kaj la latvan registaron, kaj analoge la estonojn kaj litovojn. Ne forgesu la fakton, ke dum la lastaj 70 jaroj la rusa homo al kutimiĝis pensi, ke ĉie estas lia hejmlando (laŭ la latina proverbo *ubi bene, ibi patria* (kie estas bone, tie estas la patrujo) kaj ke ĉie li devas esti ŝatata. Dum tiu longa periodo li al kutimiĝis ankaŭ al siaj privilegioj en fremda lando (senpage ricevataj loĝejoj en modernaj domoj, pli prestiĝaj laborlokoj, ktp.). Nun, kiam la politika situacio ŝanĝiĝis, li ne volis esti „degradita” al ordinara homo, egala al la praloĝanto. Nome pro tio ili neniam pardonos al estonoj, latvoj kaj litovoj ilian liberiĝon de rusa subpremado kaj penas prezenti la nunan situacion en pli malfavora lumo por si mem.

Nur praloĝantoj estas civitanoj

Ĉiu civilizita ŝtato havas la eblon elekti siajn civitanojn. Ĉu enmigrintoj kaj okupantoj povas esti samtempe civitanoj de tiu ĉi lando? Kompreneble ne. Nur praloĝantoj de la nomita lando povas esti civitanoj. Sed atentu, ke laŭ la liberalaj leĝoj en Baltio oni povas iĝi civitano laŭ certa proceduro antaŭvidita por tio, se oni plenumas kelkajn postulojn, kiel la minimuman konon de la loka lingvo (en Estonio ekzemple oni devas koni sole 1500 estonajn vortojn). Do, ĉiu rusa, kiu plenumas la postulojn, povas iĝi civitano de tiu ĉi lando, kie li loĝas, se li volas.

La realeco montras klare, ke la plimulto de la rusoj loĝantaj en la baltaj ŝtatoj, entute ne volas fariĝi civitano de tiuj ŝtatoj. Ili nur volas esti kaj resti civitanoj de Ruslando. Ĉu ne estas diskriminacie, ke ni estonoj devas uzi ruslingvajn poŝtaĵojn, ke en ĉiuj niaj poŝtofojejoj laboras nur rusoj, kiuj ne komprenas nian oficialan ŝtatan lingvon?

Homaj rajtoj

Alia afero estas la homaj rajtoj. Ĉiu homo, sendepende de nacieco kaj civitaneco, havas en la baltaj landoj



„Luma Maro”: Demonstraciintoj antaŭ la viena parlamentejo.

egalajn rajtojn. Kial do B.N. mensogas asertante, ke al la rusoj mankas la homaj rajtoj? Eĉ pli, li skribis, ke rusoj estas forpelitaj de siaj hejmoj. Ĉu li povas konfirmi tion per faktoj? Certe ne, ĉar tiuj faktoj simple mankas. La rusoj bone scias, ke Baltio estas la plej kvieta kaj plej tolerema loko por ili; inter alie pro tio la rusoj ĉiam preferis loĝi ĉi tie. Proksime de Eŭropo! La kerno de la problemo estas, ke la rusoj ne volas integriĝi en la lokan socion, ili ne volas lerni la lokan lingvon, ili ne volas obei al lokaj leĝoj, ktp. Ili al kutimiĝis al la rusa lingvoimperiismo kaj grandŝovinismo. Malfacilas esti egala al ĉiuj.

Sendependeco ne plaĉas

Ŝajnas, ke B.N. entute ne respondecas pri siaj vortoj. Sendependeco de Latvio tute ne plaĉas al li. Li skribas pri nova diktaturo pli kruela ol komunismo. Ĉu vere io povas esti pli kruela? Kion defendas B.N.? Ĉu la rusoj en la baltaj landoj bezonas defendon? Tute ne, ĉar ili vivas ĉi tie en pli bonaj kondiĉoj ol en sia origina patrujo. Defendon bezonas la praloĝantaro pro la ĝisnuna genocida politiko fare de ili. La celo de B.N. estas fendi, frakciigi kaj kvereligi la diversajn naciojn inter si. Tre konata politiko jam de la cara tempo! Oni minacas nin per civitana milito. Do, ĉiuj argumentoj de B.N. lamas. Logiko mankas. La baltaj landoj ne volas plu esti sub la diktado kaj premo de fremdulo, ili volas nur vivi en sia propra domo.

Kio estas rasismo?

Simila sinteno al tiu de B.N. estas ankaŭ la vidpunktoj de Sergej Kuznecov en la artikolo „Rasismaj tendencoj en eks-Sovetio (MONATO, 1993/1, p. 20). Laŭ la opinio de Kuznecov, la lingvoleĝoj de la baltaj ŝtatoj estas diskriminaciaj kaj malmoralaj. Laŭ li, estono estas naciisto, se li parolas sian gepatran lingvon, sed ruso, kiu parolas sian lingvon, ne estas naciisto. Denove logiko mankas. Se lingvisto mem ne volas kompreni la problemon, tiam ni ne povas kredi al lia kompetenteco. Kial Kuznecov ne parolas pri la „saĝa” partia lingvopolitiko, pri alinacigo kaj rusigo de minoritataj nacioj? Ni ĉiuj ĉi tie travivis tiun ĉi danĝeron kaj bedaŭrinde ĝi daŭras ankaŭ nun. Do, la celo de B.N. kaj Kuznecov estas pentri al eksterlando malbonan bildon pri Baltio. La propagando el Moskvo kontraŭ ni daŭras. La akuzoj estas stultaj kaj senenhavaj. Mi scias, ke ne ĉiuj rusoj pensas same kiel B.N. kaj Kuznecov, ne ĉiuj rusoj estas grandŝovinistoj.

Helju VIRES

2a. La 39jara generalmajoro Ruslan Auŝev fariĝas la unua prezidanto de la aŭtonoma inguŝa respubliko en Kaŭkazo.

3a. Usono komencas peraviadile disĵetadi nutraĵojn kaj medikamentojn super Bosnio.

3a. Beogrado konfirmas la novan ĉefministron de „Rest-Jugoslavio”: Radoje Kantić, lojalulo de Miloŝević.

3a. Pro la neelekto de la oficiala kandidato de la socialista partio de Svislando por la konfederacia registaro, eksplodas akra diskuto ĉu la socialistoj forlasu la tradician registaran koalicion kaj estonte ludu la rolon de vera politika opozicio.

8a. Scalfaro, itala prezidanto, rifuzas subskribi dekreton, kiu kvazaŭ senŝarĝus la koruptajn partifunkciulojn. Pluraj altrangaj politikistoj demisias pro sia supozata enmiksiĝo en la mafio.

9a. Kuracisto Albert Zafy, opozicia gvidanto de Malagasio, venkas la prezidantajn elektojn. Per tio la 17jara erao de Didier Ratsiraka finiĝas.

10a. La svisa parlamenta krizeto solviĝas per la elekto de la juddevena socialistino Ruth Dreifuss en la registaron. Ŝi estas la dua virino en la historio de la svisa registaro.

11a. Por la sesa sinsekva vojo Suharto fariĝas prezidanto de Indonezio.

11a. Ekskomunisto Slezevicius iĝas nova ĉefministro de Litovio.

12a. La rusa kongreso de popoldeputitoj, kiu post la disiĝo ankaŭ ne reelektiĝis kaj do plimulte konsistas el ekskomunistoj, esence limigas la povon de prezidanto Jelcin.

12a. Norda Koreio anoncas, ke ĝi forlasos la internacian kontrakton pri neapliko de atomarmiloj. Suda Koreio malpermesas al siaj civitanoj komerci kun la nordo.

14a. En Aŭstralio la laborpartio kun sia ĉefministro Keating venkas la elektojn je la kvina sinsekva fojo.

15a. La nova konstitucio de Andoro unuafoje donas al ĝia popolo la politikan suverenecon.

16a. Islamaj radikaluloj murdas altrangulojn en Alĝerio kaj bombatakas turistajn busojn en Egipto. La egipta polico severe reagas. Alĝerio rompas la diplomaciajn rilatojn kun Irano.

16a. La nova komunisma popol-

kongreso de Kubo konfirmas Fidel Castro-n kiel ŝtatestron. Diverslandaj nobelpremiitoj protestas kontraŭ la malrespekto de la homaj rajtoj sur la insulo.

17a. Pluraj bombeksplodoj en Kalkato kaj Bombajo maltrankviligas Hindion.

17a. En Abĥazio ekscesas sanga batalo inter sendependemuloj kaj kartvelaj ŝtataj armetaĉmentoj.

19a. Wörner, ĝenerala sekretario de NATO, unuafoje vizitas Albanion.

20a. Pro la publike anoncita dekreto de Jelcin, enkonduki limigitan prezidantan reĝimon en Rusio, la politika konflikto en Moskvo atingas sian kulminon. Jelcin postulas, ke la rusa popolo decidu mem pri la estonta politiko en la lando.

22a. Ĉe la Internacia Kortumo en Hago Bosnio oficiale plendas kontraŭ „Rest-Jugoslavio” pro genocido. En Bosnio dume la milito furoradas.

23a. Ĥasbulatov, rusa parlamentestro, anoncas eksoficigan proceduron kontraŭ Jelcin. Usono kaj pluraj aliaj okcidentaj ŝtatoj vorte apogas Jelcin.

25a. Izetbegović, prezidanto de Bosnio, post longa hezitado subskribas la projekton de UN-intertraktantoj Cyrus Vance kaj David Owen pri la teritoria disdivido de la lando. Ankaŭ la kroatoj akceptas la planon, dum la bosniaj serboj rifuzas ĝin.

26a. La rusa popoldeputita kongreso akuzas la ŝtatprezidanton je kontraŭkonstituciaj agadoj. Jelcin retiras sian dekreton.

28a. En Francio la burĝaj partioj venkas la parlamentajn elektojn akirante pli ol 80 % de la mandatoj: la regantaj socialistoj falas al sensignifa parlamenta malplimulto. La senlaboreca kvoto en Francio estas 10,6 %.

28a. La rusa popoldeputita kongreso voĉdonas pri eksoficigo de Jelcin kaj Ĥasbulatov: En la kazo de Jelcin la baloto fiaskas pro nur 72 voĉoj.

28a. Li Peng estas konfirmata kiel nova ĉefministro de Ĉinio.

29a. Bérégovoy, socialista ĉefministro de Francio, demisias. Lin sekvas la gaulisto Edouard Balladur.

30a. Al la murdo de 2 israelaj policistoj Jerusalemo reagas per la fermo de la Gaza-strio kaj de okcidenta Jordanlando.

TRAFIKO

Kiel malperdi ŝoforpoentojn?

„Sentemigi al la risko kaj sekvoj de trafik-akcidentoj”: tiel difiniĝas oficiale la celo de la staĝoj kiuj okazas, ekde la pasinta jaro, minimume ĉiusemajne en almenaŭ unu urbo de ĉiu departemento de Francio. La staĝo celas ŝoforojn kiuj perdis pro trafika delikto iu(j)n el la 12 poentoj de sia kondukpermeso.

D-ro István Ertl sen., trafika inĝeniero, demandis por MONATO la sociopsikologiinon Fabienne Berthelot, kiu kunestras tiajn staĝojn, pri la trafiksekureco en Francio, pri la poent-sistema kondukpermeso kaj pri la staĝoj.

MONATO: Kial oni decidis enkonduki la poent-sisteman kondukpermeson?

BERTHELOT: Ĝis 1957 Francio eĉ ne statistikis siajn surŝoseajn akcidentojn. Post 1957 la kvanto de aŭtoj kaj ankaŭ de ŝoseaj akcidentoj kreskis preskaŭ regule per ĉiujaraj 3 %, ĝis la funebra rekordo de 16700 mortintoj en 1972. En tiu jaro oni enkondukis la devigan uzon de kasko sur motorcikloj kaj de sekurzono sur la antaŭaj sidlokoj en aŭtoj. Ĝis 1973 drinkinteco estis eĉ malpligraviga cirkonstanco por kaŭzinto de akcidento. Poste oni toleris 1,2an alkoholemion¹.

Por mencii nur lastatempajn evoluojn: ekde 1991 ekzistas la devigo uzi sekurzonojn sur la malantaŭaj sidlokoj kaj la rapidlimigo de 50 km/h en loĝataj zonoj. Ĉi tiuj novaj paŝoj alportis rezultojn: por 1991 oni registris „nur” 10 000 mortintojn, kaj por 1992 eĉ malpli ol en la jaro 1957, kiam la aŭtaro nombris nur trionon de la hodiaŭa kvanto. La leĝo pri poent-sistema kondukpermeso, aprobita en 1991, pro diversaj komplikajoj ne povis esti aplikata pli frue ol ekde la mezo de 1992; tial la ĉi-ri-lataj reguloj datitaj la 1-an de decembro 1992 havas retroaktivan validon. Cetere, oni diskutis pri la poent-sistema kondukpermeso jam dek jarojn, sed ĝia malpopulara enkonduko estis ĉiam prokrastata jen pro elektoj, jen pro aliaj politikaj kaŭzoj.

La franca sistemo havas antaŭulojn en ekzemple Kanado, Japanio, Germanio, Aŭstrio, kelkaj usonaj ŝtatoj. La franca modelo plej similas al la germana, sed ankaŭ diferencas de ĝi, ekzemple pro la enplekto de psikologoj.

MONATO: Kiel funkcias la poenta sistemo?

BERTHELOT: Ĉiu nova ŝoforo startas kun 12 poentoj, kiujn li gardas ĝis subtraho pro delikto. Trorapideco ekzemple puniĝas, laŭ sia graveco, per subtraho de 1-4 poentoj. La poentoj estas administrataj en unu centro, en la komputiloj de la Ministrejo pri Transporto. Neniu rajtas esti informata pri ili, krom la koncernato mem kaj krom la juĝisto taskita pri lia kazo. Por eviti erarojn, oni sendas avizon pri ĉiu subtraho de poento. La subtrahoj adiciĝas, sed ankaŭ eblas regajni poentojn, en du manieroj. Unue, pasive: post ĉiu

3jara periodo de senerara ŝoforado oni aŭtomate reakiras ĉiujn antaŭe perditajn poentojn. Due, aktive: plenumo de la staĝo gajnigas 4 poentojn. Kompreneble, ĉe perdo de ĉiuj poentoj oni retiras la stirpermeson.

MONATO: Kiu organizas kaj financas la staĝojn?


BERTHELOT: Organizas ĝin *Prévention Routière* (Asocio por Preventado Ŝoseajn Akcidentojn), kiu estis fondita post la milito kun neprofito celo. Ĝi ne estas submetita al la ministrejo kaj administras tutlandan reton.

La staĝojn financas la staĝanoj mem: la 1400franka kotizo estas malpli ol la punsumo pagenda pro 2poenta delikto. Ili devas oferi por la staĝo du labortagojn – ne nepre feriajn, se ilia dunganto konsentas. Krom la instruado, la partoprenantoj ricevas por la kotizo nur kafon en la paŭzoj, sed kutime ili ne bezonas elspezi por tranoktado, ĉar ĉiu iras al staĝejo proksima al sia hejmloko.

La staĝojn kungvidas unu psikologo kaj unu trejnisto de ŝofor-instruantoj.

MONATO: Kiel disvolviĝas la staĝo?

BERTHELOT: En la unua mateno, ĉiu prezentas sin, la partoprenantoj rakontas pri sia delikto, eligas sian agresemon. Ili rajtas insulti la ŝtaton, la trafikinstancojn, la staĝon mem. Ili



Alkoholo kaj akra-frapa stir-stilo estas la precipaj kaŭzoj de la akcidentoj kun gravaj – ofte mortigaj – sekvoj.

ja plejparte ankoraŭ ne havis okazon malpezigi sian animon – nun ili povas. Ni, la instruantoj ne kontraŭdiras, toleras ĉion ĉi kun komprenema humuro. Poste ni projekcias datenojn pri akcidentoj, demandas la partoprenantojn pri iliaj impresoj, kaj nur fine ni konfrontas iliajn opiniojn kun la faktoj.

Posttagmeze ni alprenas pli aktivan rolon. Unue ni parolas pri la fiziologiaj bazoj de ŝoforado (vido, laciĝo, ripozo, ktp.). Ni montras kiel kalkuli bremsodistancon surbaze de la reago-tempo de ŝoforo. Kutime, la longeco de la distanco surprizas la staĝanojn, kiuj fariĝas pli atentemaj. Sekvas aliaj problemoj: Kiaj deliktoj estas oftaj kaj kial? Kiaj iluzioj kaŭzas ke ŝoforo juĝas utile malrespekti iun regulon? La unua tago atingas sian celon kiam la partoprenantoj ekpretas agnoski la danĝerecon de sia propra delikto.


En la dua mateno la staĝanoj analizas realajn akcidentojn pere de dokumentoj. Tio donas okazon por individua dialogo inter la staĝanoj, sed ankaŭ kun la instruantoj. Post komuna resumo de la analizoj ni alvokas la atenton al gravaj detaloj. Kiel resumo servas ankaŭ 20minuta filmo. La posttagmezo ekas per klarigado de la poent-sistemo, kio vekas kontraŭstaremon ĉe la partoprenantoj. Poste, demandoj ligitaj al alkoholo gajigas ilin. Post paŭzo sekvas ripeto pri la risiko-faktoroj. Fine, ni tuŝas demandojn de alia karaktero: Kion simbolas aŭto? Kiajn ideojn ĝi elvokas (simbolo de bonstato, de vireco, estetika objekto, ktp.)? Kion reprezentas la rapideco? Efiĝecon, ŝparon de tempo... kaj riskon! 10minuta filmo prezentas sintenojn karikaturrece troigitajn (iu insultas policiston, fajfas pri rapideclimigo, ktp.). Ĉiuj komune konkludas: rapideco estas multe tro pozitiva nocio por la homoj, mito ligita al sukceso. En la hodiaŭa mondo sekureco valoras malpli ol rapideco. Fine, la partoprenintoj donas pritakson per notoj pri la staĝo.

1. Alkoholemio: la kvanto de alkoholo en ies sango, esprimata en pro-miloj (‰).

AŬTO-INDUSTRIO

Ĉinio, ĉu burĝonta merkato?

Antaŭ la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko aŭtomobilo estis luksa objekto por ĉinoj. Dum la periodo de



Kreskanta aŭtomobil-merkato en Ĉinio: Ĉu baldaŭ la permotora veturilo forpuŝos la biciklon de la vojo?

Maŭ Zedong (1949-1976) apenaŭ troviĝis privataj aŭtomobiloj en Ĉinio. Nur altrangaj funkciuloj uzis aŭtomobilojn dum laborado, kaj eĉ urbestroj en provincoj uzis ĵipojn. Tiam aŭtomobilo preskaŭ fariĝis simbolo de gvidposteno en la registaro. Maŭ mem uzis aŭtomobilon de marko Ruĝa Flago, produktita de la 1a Aŭtobusa Fabriko en urbo Changcun, Ĉinio.

Dum la 80aj jaroj iuj ĉinoj riĉiĝis. Kun la vivnivela altiĝo de ĉinoj, iuj jam posedas proprajn aŭtomobilojn. Laŭ lastatempa statistiko nun 37000 aŭtomobiloj estas posedataj de privataj personoj en Ĉinio. Ĝis la fino de 1992 en Pekino estis nur 8000 privataj aŭtomobiloj. En urbo Kanton dum la lastaj tri jaroj 354 inter la 1342 forvenditaj aŭtomobiloj estis aĉetitaj de privataj personoj. Tio konsistigas 20,4 % de ĉiuj aŭtoj. En urbo Tianjin dum 1991 285 inter

4130 aŭtomobilojn posedis privataj personoj.

Nuntempe la nove riĉiĝantan tavolon tre interesas aŭtomobiloj, precipe la novaj luksaj tipoj. Eble familioj kun aĉetkapablo estontece ŝveliĝos la ĉinan aŭtomobilan merkaton.

Shi CHENGTAI

Biciklantoj okupas vojkruciĝon

En Gent (Belgio) biciklantoj trovis taŭgan – sed ankaŭ bedaŭrindan – manieron por atentigi pri sia danĝera ŝatokupo. Ĉiufoje kiam en la urbo biciklisto mortas en trafik-akcidento, ili okupas gravan vojkruciĝon por atentigi la publikon kaj la politikistojn pri la danĝeraj situacioj. Jam plurfoje ĉi-jare ili atingis la televidan ĵurnalon. Estas bedaŭrinde ke nur tiel ili ricevas iom da atento, sed ŝajnas ke multaj aŭtomobilistoj – viciĝantaj ĉe la okupitaj vojkruciĝoj – ne aprecas la iniciaton. gvd

Biciklistoj ne entuziasmas por filmo pri akcidentoj

En oktobro 1992 ekis en Amsterdamo okmonata kampanjo „Sekure surbicikle”. Senlampaj biciklantoj povas elekti ĉu pagi punon – ĝis 80 guldenoj (iom pli ol MONATO-abono) – ĉu aĉeti lumilaron por kvardek guldenoj, kiun oni surmuntas por ili surloke. Dum la regul-rompintoj atendas la pretiĝon de sia biciklo, ili povas spekti filmon pri trafika sekureco en la „surrada policejo”, buso kun informadika kaj vidbenda aparataro.

Dum la unua vespero de la kampanjo neniu el la ĉ. 30 haltigitaj elektis la monpunon. Unu biciklisto postlasis sian veturilon ĉe la polico, ĉar li juĝis ke ĝi ne valoras la koston de lampo-munto. La dua

tago estis malpli sukcesa: nur duono de la malregululoj elektis la almunton de lumiloj. Laŭ proparolisto de la polico, la aliaj ne havis tempon aŭ emon atendi. Ankaŭ la filmo ne vere furoris: nur du el la haltigitaj volis spekti ĝin dum la unua vespero.

Ne ĉiuj volas submetiĝi al la elekto inter monpuno kaj nova lamparo. Haltigita virino diris ke ĝuste antaŭ kelkaj tagoj ŝi aĉetis novan lampeton por sia biciklo, sed ŝi ankoraŭ ne trovis homon por surŝraŭbi ĝin. La informo ke ŝia pun-protokolo estos nuligita se ŝi aperos dum la posta tago kun la muntita lamparo ĉe la trafikpolico, mirigis kaj kontentigis ŝin. IE

Ĉu tomate por agi homfrate?



La 12an de marto Britio denove submetiĝis al la amas-histerio de la „Ruĝnaza Tago”. La celo de la tago estas kolekti monon por diversaj, sed nedifinitaj „bonfaraj” agoj surbaze de komedio kaj humuro. Homoj elpensas stultaĵojn kaj petas la monan subtenon de aliaj por realigi ilin – ekzemple, oni petas subvenciojn por ĉiu horo dum kiu oni sidas en bankuvo plena je malvarma avenkaĉo. La stratojn invadas

...Suddenly the invading tomatoes found an ally!




To help the invasion of the comic tomatoes and support Comic Relief, look out for the special **M&M's** Red Nose Bags.

3p is donated with every pack, which goes directly to projects in Africa & the U.K.

Kompreneble komercistoj trovas okazon profiti...

taĉmentoj de klaŭnoj, bestoj kaj aliaj kostumitaj estaĵoj, kiuj ŝovas sitelojn sub la nazon de ĉiu preterpasanto por kolekti de li monerojn. La televida kompanio BBC aparte klopodas, ke neniu forgesu pri La Tago: ekde la 4a posttagmeze ĝis la 2a matene prezentiĝas senvaria vico de humoraj elsendoj, kaj dum la intervaloj ekscitiĝemaj prezentantoj ŝrikas pri la ĝisnuna sumo kolektita pere de apartaj telefonaj „donac-linioj”. Por kelkiuj, la tago fariĝas ne nur neevitebla, sed ankaŭ deviga. Ekzemple, lernejo, kiun ĉeestas la infanoj de la raportanto, postulas, ke la infanoj pagu tridek pencojn por havi la privilegion ne porti lernejan uniformon dum la tago – kaj tamen difinas, ke la „maluniformo” estu unukolora. Cetero, por lernantaro de 250 infanoj, ĝi jam mendis 200 ruĝajn nazojn, kiujn ĝi vendas kontraŭ la ne malgranda (por infano) sumo de 70 pencoj. Ĉu surprize, ke neniu aŭdacas veni sennaze en kutima uniformo?



La nazoj estas la kerno de la afero. Temas pri ruĝa plasta globforma klaŭna nazo, kiun oni portas surstrate kaj ĉepostene por montri subtenon al la afero. Haveblas nazoj ne nur por homoj, sed ankaŭ por aŭtoj, pli grandaj por kamionoj, eĉ pli grandaj por dompordoj, kaj grandegaj por oficejaj konstruaĵoj, k.s. La organizantoj tre ruze aranĝas, ke la pasintjara nazo ne plu validu. Tial, ĉi-jare la nazo havas aldonan verdajon por aspekti kiel tomato. Poste la plastaj nazoj, por kies fabrikado oni uzis energion kaj nerenoveblan nafton el la tero, estas forĵetitaj por aldoni al la rubaĵproblemo de la socio. Kaj ĉiu, aĉetinta kaj forĵetinta sian ruĝan nazon, kaj ĵetinta kelkajn monerojn en sitelon de klaŭno, povas malstreĉiĝi kun la virta sento de bonfaranto, kiu faris ĉiun eblan por helpi al siaj homfratoj – ĝis la venonta jaro.
Krys UNGAR

Gejoj: pli gaja sorto?

En Litovio la unuaj, kiuj infektiĝis per aidoso, estis samseksemuloj. Tial antaŭ unu jaro estis oficiale kreita grupo por subteni gejojn. La grupo nomiĝas *Naglis*, kaj same titoliĝas ĵus aperinta gazeto. Ĝia redaktoro asertas, ke publikiĝos nek pornografiaj fotoj, nek intimaj historioj.

Litovaj gejoj plendas pri hodiaŭa socio, kiu ne komprenas ilin. La gazeto de gejoj estos distribuata neoficiale, ĉar en Litovio samseksema aktivado estas kontraŭleĝa, kvankam anoj de grupo *Naglis* supozas, ke en Litovio vivas minimume 40000 gejoj. Jam oni cerbumas pri geja kafejo aŭ klubo en Vilnius. Nur tie gejoj povus bone distriĝi. Tamen, post malfermo de geja kafejo necesus serioze pripensi, kiel prizorgi ĝian sekurecon. Tio neprus. Antaŭ kelkaj jaroj gazeto skribis pri gejoj kaj iliaj renkontiĝlokoj. Baldaŭ gejoj suferis pro la atakoj! Eĉ formiĝis speciala atakgrupo. Tia maltolerema sinteno kontraŭ gejoj certe malhelpas al ili preparoli siajn problemojn publike.

La redaktoro de la geja gazeto mem spertis maltoleremon. Dum soveta periodo li estis maldungita, kelkfoje vokita al policejo. Antaŭ nelonge najbaroj vidis lin en televida programo pri gejoj, dancanta kun alia viro. Iu informis lian patrinon, kiu ploris preskaŭ duontagon. La alia viro estis elpelita el sia hejmo de siaj gepatroj. Ĝis nun en Litovio validas leĝo pri „Kontaktigo de viro kun viro”. La lasta enkarcerigo pro tiu leĝo estis liberigita lastaŭtune. Nun jam estas preparata nova leĝoprojekto, sen tia artikolo. En Litovio samseksemuloj estos punataj nur, se ili penos perforti malplenkreskulojn. Nuntempe pro tio estas malliberigitaj ĉirkaŭ tri dekoj da personoj. Litovaj gejoj asertas, ke post aprobo de nova leĝo rajtoj de samseksaj minoritatoj en Litovio estos jure protektataj. Morale tamen ili nuntempe kaj verŝajne ankoraŭ longtempe estos neglektataj. Gejoj ne postulas specialan atenton, sed ili revas nur pri humana respekto, por ke ili povu vivi tiel, kiel decidis ilia sorto.

Laimius STRAŽNICKAS

Kontribuojn por la rubriko „moderna vivo” vi sendu al:

Paul Gubbins
3 Arden Court
Mossley
Congleton, Cheshire
Britio CW12 3JH

FINANCOJ

La pli alta eno

La eno, japana valuto, krute altiĝis en malfrua februaro, elvokante variajn komentariojn.

La influhava ekonomia tagĵurnalo, *Nihon Keizai* („Japania Ekonomia Ĵurnalo”), ekvivalento de la *Wall Street Journal* de Usono, portas artikolon, kiu diras ke la nuna situacio, instalita, laŭ la ĵurnalisto, de elparolo de la usona ministro pri financoj Bentsen, memorigas similan eventon en 1985, tiun post la tiel-nomata akordiĝo de Plaza. La aktuala estas ripetigo de samo se oni anstataŭigas la nomon de Baker al Bentzen: intrigisma interpreto de l' ekonomio.

Tia rezonado estas dividata de multaj fakulaj kaj amatoraj komentariantoj, kvazaŭ la iro de la ekonomio estas gvidata de homa volo. Se tiel estus, la rolo de politikisto estus facila. En realo, oni neniel povas regi la ekonomion, oni povas nur iom dresi ĝin se la aplikado de forto observas la mekanikon. Se la dolaro malaltiĝis post Plaza, tio ne estis kaŭzita de la G7¹, la ekonomio jam volis ĝin, kaj ĝi realiĝis. La interveno de centraj bankoj en la valutan merkaton utilas nur por pliglatigi la fortajn fluktuojn de kurzoj cele al la stabiligo de la ekonomio. La longdaŭran tendencon de kurzoj ili ne povas decidi arbitre.

Antaŭ ĉio, estas enigme kial la eno ne estis pli alta kiam akumuligadis krediton en la bilanco de pago de Japanio. Ĉiuj eksterlandanoj, usonaj kaj eŭropaj, de Lee Iacocca [Li Ajakoka], de la aŭtokompanio Chrysler [Krajsler], ĝis homo sur strato, akuzas Japanion pro la granda eksceso de ĝia eksporto super la importon.

Se eksporto estas pli granda ol importon, la postulo de la valuto de tiu lando estas pli granda ol ties propono. Estas evidente ke la prezo de tiu valuto pliiĝas, kiel iu ajn varo. La prezo de tiu mono altiĝos ĝis ekvilibro de l' fremda bilanco estiĝos. En la okazo de la eno, tio ne okazis. Kial?

Malsimile al la okazo pri individuoj, estas absurdaĵo ke lando havas grandan kontantan saldon ĉe bankoj: tiu naskas nur malgrandan interezon, kio egalas al la konduto de avarulo kiu tenas grandan stokon da oro. La mono povus esti uzata por utilaj celoj. Japanio havante grandan rezervon de fremdaj valutoj neniel estas enviinda, kontraŭe ĝi estas idioto, sed ne estas

probable ke ĉiuj japanoj estas idiotoj (aŭ ĉu?). Tiu pluso de la kuranta konto estas alia flanko de la negativa spezbilanco en la kapitala konto.

Nome, japanoj investis fremdlande. Kion ĝi signifas? La atendo de profito eksterlande, per aŭ la aĉeto de fremdaj akcioj kaj aliaj valoraĵoj aŭ la akiro de fabrikoj aŭ terenoj trans la landlimo. Tio estas la fama eksceso de ŝparo super investo ĉe la japanoj. Oni akuzas japanojn pro neaĉetado de fremdaj varoj, sed, kiel supredirite, ili ja aĉetas valoraĵojn, kiuj fine reduktiĝas al fizikaj bonhavo, kaj se ne tiel estus, japanoj estus stultuloj kiuj liveras varojn al fremdlandanoj sen ricevi kontraŭvalorojn.

La alia flanko de la medalo estas ke la usonanoj malŝparas, ŝparas negative, t.e. konsumas per likvigo de sia pasinteca ŝparo. En ekstrema okazo, tio rezultus en tion ke la usona tero kaj kapitalo estos en la mano de la japanoj. Kio tamen neniam okazos; jam komenciĝis reago, kaj la eno ekaltiĝis. Tiu bildo estas pentrita de usonaj fabrikistoj por instigi limigon de importon, kies celo estas ilia monopoligo de la enlanda merkato. Ĉiu restriktio de konkurenco estas por sekurigo de monopola profito: tio estas aksiomo. Kiuj pretendas paroli por publika bono estas la veraj profitantoj.

*Rockefeller Center*² ne estas nura varo, ĝi estas simbolo de Usono mem, oni dirus; vere, forgesante la fakton ke ties vendon decidis sinjoroj Rockefeller mem kaj akceptante la justan koleron de nefamilianoj iom intervenemaj, oni povas kompreni popolan senton. Estas rajto de la usona registaro malpermesi la negocon, la ŝtato povas fari ion ajn, rigardu la mortopunon. Ĝuste kiel la rizo ne estas nura varo por japanoj. Kio okazus? Malpermesite investi fremdlande, japana kapitalo, ne povante uziĝi trans la limo, ne povas fari alion ol reveni al la hejmlando. Jen okazas superfluo de kapitalo. La pluso en la ekstera komerco, ne povante esti absorbita de la kapitala konto, devas speguliĝi en la leviĝo de la kurzo de la eno, neeviteble venigante la malaperon de pozitiva komerca bilanco.

Oni diras ke la japana merkato estas

fermita kaj ke por puni ĝin oni devas limigi importon de, ni diru, japanaj aŭtomobiloj. Oni kredas ke tiamaniere oni sukcese protektas la intereson de sia lando. Ĉu vere? Kiel vidite supre, pluso en la fremda bilanco tute ne estas dezirinda afero, aŭ pli ĝuste, tio ne eblas ĉar la bilanco ekvilibriĝas laŭnature. Nu, supozu ke importon de japanaj aŭtomobiloj estas limigita kaj la minusa bilanco de iu lando kun Japanio estas eliminata. Ĉu tio estas al la profito de importanta lando? La sola rezulto estas ke ĝiaj produktaj faktoroj estis redistribuitaj je la profito de aŭtokompanioj. Aliparte, la konsumantoj suferas perdon, devante pagi pli multe por aŭtoj. La registaro do subvencias la aŭtomobilfabrikantojn, impostante la konsumantojn.

Aliaj branĉoj ol la aŭtomobila de la importa lando ankaŭ suferas ĉar la eno ne altiĝas sufiĉe tiel ke aliaj eksportoj de Japanio ne estas sufiĉe altprezaj. Tial la aŭtomobila industrio de tiu ĉi lando ekspluatas ankaŭ aliajn industriojn.

La japanaj aŭtofarantoj, kiuj havas kvoton artefarite asignitan, povas profiti de ne sufiĉe alta kurzo de la eno; ili ĝuas sekurigitan pozicion, ŝirmite de konkurenco. Dume, aliaj japanaj produktantoj ankaŭ ĝuas malaltan kurzon de la eno.

La limigo de internacia komerco estas do ne internacia konflikto sed interna, malgraŭ tuta gamo de patriotaj devizoj.

Certe, se iu registaro favoras unu industrion prefere al aliaj, tio povas baziĝi sur nacia intereso. Ekzemple, de la vidpunkto de la nacia ekonomio, *computer chips* (komputilaj mikrocirkvitoj) ne estas egalvaloraj al *potato chips* (terpomflokaj). La registaro havas rajton teni tian politikan vidpunkton. Tio estas por kio la registaro estas. Se registaroj ne estus farintaj tion, Japanio, eĉ Germanio, estus agrikulturaj landoj, superregataj de Britio, la 19jarcenta fabriko de l' mondo. Ankaŭ rigardu tiujn bananorespublikojn de Centra Ameriko. Tamen la problemo konsistas en valorjuĝo pri la relativa graveco de industrioj, ne la simpla pri pozitiva aŭ negativa internacia bilanco.

Aliflanke, japanaj eksportantoj nun timas la efekton de la forta eno. Ilia deziro estas ke la eno ne altiĝas kaj ke samtempe la bilanco de internaciaj pagoj ekvilibriĝas por eviti atakon de eksterlandanoj. Tio estas voli manĝi la kukon kaj havi ĝin. Japanaj ĵurnaloj argumentas ke altigo de la eno ne efikas ĉar tio grasigos la profiton de la

importantoj kaj ne multigos la importon, ne malaltigante la prezojn. Kion tiam ili proponas anstataŭe? Se la profito devenanta el la altigo de la eno ne povas esti ĝuata de la konsumantoj, tio simple signifas ke konkurenco mankas en Japanio. La tasko de la registaro estas elimini obstaklon al konkurenco per rigora apliko de la antitrusta leĝo, ne instali administrajn regulojn, morale riproĉante komercistojn. Pululas en Japanio, kaj ne nur, kvazaŭsocialistoj.

Aliflanke, eldiroj de usonanoj estas konfuzitaj. La nuna altiĝo de la eno estas nur tro dezirinda por korekti la neekvilibron de la internacia bilanco. Ili sinteno al la kurzo de la dolaro estas ambigua. Por la amaso la dolaro estas simbolo de la prestiĝo de Usono mem. De tie venas la sentimentalaj argumentoj por la reteno de la dolara kurzo fronte al la negativa bilanco. Tion senteme spegulas demagogoj.

Estas ja dezirinde ke la dolaro, LA internacia pagilo, estu stabila. Ĉar tamen tio estas nebla, estas tempo ke oni detronigu la dolaron kiel la aksan monon de l' mondo. Anstataŭe, oni serĉu la manieron kiel oni surtroni la monon ne dependantan de unu nacia ekonomio. Jam estas sur la sceno kandidato: SDR (speciala traktado el la Internacia Mona Fonduso). Akcesore staras la ekuo.

YAMASAKI Seikō

1. Grupo de sep ŝtatoj (Usono, Kanado, Britio, Francio, Germanio, Italio, Japanio) kies estroj regule kunvenas por pritrakti la problemojn de la mondo. (red.)

2. Rockefeller [Rokefela]: John D. Rockefeller (1839–1937) kreis industriaran imperion, kies simbolo iĝis la *Rockefeller Center*, aĉetita de japanaj investantoj. (red.)

BULGARIO

Tera reformo akceliĝas

En Bulgario la likvido de la agrikulturaj kooperativoj restintaj kiel heredaĵo el la totalisma planekonomio rapide antaŭeniras. El ĉiuj 5 110 500 hektaroj kiuj devas esti redonitaj al ties antaŭaj posedantoj, en 1992 oni transdonis pluajn 447 979 hektarojn en ekzistantaj aŭ en restarigeblaj realaj limoj. Ĝis nun la redonita tero egalas al 2,1 milionoj da hektaroj (41 %). Por provizora uzo estas disponigitaj 300 000 hektaroj fare de la komisionoj pri tero-redono.

La restarigo de parceloj al la antaŭaj posedantoj estis akompanata de kolera rezisto kaj sabotado fare de la

senpotencigitaj komunistoj. En la vilaĝoj ili kaŭzis malkonfidon ĉe la malsertaj kamparanoj kaj sugestis al ili timon je la ĉiam sopirata proprieto.

Somere de 1992 oni organizis protestojn: vilaĝanoj baris gravajn aŭtoŝoseojn por manifesti sian kontraŭstaron kontraŭ la likvidon de la kooperativoj (mallonge: TKZS). En tuta Bulgario okazis tiam ankaŭ protestmitingoj. Precipe en la nord-orienta parto de la lando, kie la Bulgara Socialista Partio (BSP), eksa komunisto partio, havas grandan influon, eliris multaj homoj surstraten. Deputitoj de BSP publike alvokis, ke oni malhelpu per ĉiuj rimedoj la realigon de la Leĝo pri Tero (1991) aktualigita en 1992.

En la estigita malamika etoso okazis ankaŭ malagrablaj incidentoj. Tiel ekzemple en la sud-bulgara vilaĝo Calapica post kolera disputo ebria adepto de BSP prenis sian armilon kaj mortpafis anon de la kontraŭkomunisma Unio de Demokrataj Fortoj (UDF). Tiel tiu vilaĝo estiĝis simbolo de la rezisto kontraŭ la tero-restarigaj komisionoj, kiuj redonas la teron al la antaŭaj posedantoj. Multaj kontraŭuloj simple konsideris tiujn komisionojn „nekompetentaj”. Oni ankaŭ faris sabotaĵojn, ekzemple bruligadon de mastrumkonstruaĵoj de la kooperativoj, minacis mistrakti la laborantojn en la tero-

redonaj komisionoj, kaj provis entrepreni paŝojn konservi TKSZ (kiuj plejofte restis sensukcesaj).


La tera reformo tamen malfruiĝis ankaŭ pro manko de ĝenerala valida metodiko pri pritaksado de la longdaŭraj aktivaĵoj kaj materialaj rezervoj de TKZS, samkiel pro foresto de certaj limoj inter la kamparoj de koncernaj loĝlokoj. Ĝis antaŭ nelonge pro tio en pli ol 800 loĝlokoj – 22 % el la tuto – ankoraŭ ne komenciĝis la redono de la parceloj. Tamen oni jam akceptis kompromisan solvon kaj la tero-restarigo bonorde ekfunkciis.

Oni prognozas, ke ĝis majo/junio 1993 jure estos restarigitaj la proprietrajtoj al ĝis 80 % el la ĝenerala agrikultura areo. La restantaj 20 % ampleksas agrikulturan teron, kiun povus ricevi nek civitanoj, nek juraj personoj, ĉar la juĝprocesoj je proprietrajtoj daŭre ne estos finitaj aŭ oni apelacios kontraŭ la farita disdivido.

Evgeni GEORGIEV

Kontribuojn por la rubriko „ekonomio” vi sendu al:

Roland Rotsaert
Visspaanstr. 97
B-8000 Brugge
Belgio



Saŭd-Arabio denove plivastigis la elgrundigon de nafto; jam en 1990 (pro la krizo en Kuvajto) ĝi ampleksigis la produktadon, kaj en 1991 (pro la golia milito) ankoraŭfoje faris tion je pli ol kvarono. La lando tiel nun tenas la trian pozicion de ĉiuj nafto-produktantoj. Tamen la totala kvanto elgrundigita restis proksimume sama kiel en antaŭaj jaroj (3148 milionoj da tunoj) pro tio, ke Irako kaj Kuvajto tute ne produktis kaj KŜŜ reduktis la produktadon. Ĉirkaŭ 40 procentoj de l' monda nafto venas el membroj-ŝtatoj de OPEL (Organizaĵo de Petrol-Eksportaj Landoj).

La turo de Pisa


La turo de Pizo estas bone konata en la tuta mondo, pro ĝia kliniĝo el la vertikalo. La turo estas parto de la katedrala struktura aranĝo, kiu laŭ la stilo de la romanika periodo de tiu tempo, konsistas el la ĉefa konstruaĵo, tiu estas la katedralo mem, kaj apartaj sonorilturoj kaj baptejo. El la tri konstruaĵoj, kiuj formas la tutan katedralon, la plej konata estas la sonorilturo, pro ĝia kliniĝo.

Oni komencis konstrui la turon en 1174, sed haltis post pluraj jaroj pro manko de mono. Nur post cent jaroj la konstruado finiĝis. La kliniĝo komenciĝis tre frue. Jam en la unua etaĝo la marmoraj muroj estas pli dikaj ĉe unu flanko ol ĉe la alia, kio indikas ke oni volis vertikali la turon tiamaniere. Sed tiu manovro ne sukcesis. La fakto, ke la konstruado haltis cent jarojn, sendube helpis la kliniĝon. Je la rekomenco oni denove provis krei la vertikalon: la lasta parto de la turo estas pli vertikala ol la malsupro.

En 1380, cent jarojn post la fino de konstruado, ĝi jam estis unu metron kaj duonon for de la vertikalo. Konstruistoj esprimis timon pri la kvanto da kliniĝo, sed ili ne povis konsenti pri metodoj por haltigi la deklivon. La ĉefepiskopo de Pizo petis urĝan agon fare de tiuj konstruistoj, sed la rezulto estis nula.

Frue en la 15a jarcento, denove oni deklaris timon pri la sekureco de la turo, kaj la estroj de la urbo decidis komisi arkitektojn kaj aliajn fakulojn por trovi metodon por sekurigi ĝin. Multaj estis la proponoj sed, bedaŭrinde, la problemo ne estis tiel simpla, kiel oni kredis. Ankaŭ neniu povis kompreni kial la klino okazas ĉe unu flanko de la turo, kaj ne ĉe la alia. Oni tiam ne posedis la scion, aŭ eble ne la eblecon, por studi la superstrukturon de la turo, kiel oni faris poste. Estas dirite, ke eĉ Leonardo da Vinci studis la problemon, kaj faris proponojn por vertikali la turon, sed neniu konas la detalajn planojn de tiu geniulo, krom unu aŭ du tre malnetaj skizoj.

La jaroj dum la renesanco en Pizo estis tre nepacaj kaj entute ne taŭgaj por fari studojn kaj okupi sin pri la turo, malgraŭ tio ke de tempo al tempo aperis iuj, kiuj montris intere-



La turo de Pisa. Supreniro ne plu longe permesata.

son. La politika stabileco de la duoninsulo ne estis firma, pro influo de fortaj ŝtatoj kiel Francio, Anglio aŭ Hispanio. Do, ĝis la kreo de Italio kiel unu sendependa nacio, la kliniĝanta turo ne altiris grandan atenton. Dum estas tiom multe da religiaj konstruaĵoj en la lando, kaj tiom malmulte da mono, unu pli aŭ unu malpli ne gravis!

Je la komenco de la nuna jarcento, la reĝo de Italio instigis al studoj pri la problemo. Tiuj sin sekvadis senlime; iuj kun ideoj tre ekzotikaj. Multaj el tiu ideoj detruus la formon de la turo; ekzemple metante iujn apogilojn aŭ similajn aferojn sur la fasadon de la konstruaĵo.

Plej serioza provo por vertikali ĝin estis farita en 1934 sub Mussolini. Oni decidis meti fundamenton sub la malsupro de la turo. La celo estis

pumpi betonon sub la fundamenton, metodo ne tute nova kaj ofte farita en malnovaj konstruaĵoj, kiuj montas tendencan al inklino aŭ al sinkado en la teron. Sed la pezo de la betono estis pli granda ol la rezisto, kiu ĝin subtenis kaj, anstataŭ haltigi la kliniĝon, ĝin sinkigis kaj klinigis ankoraŭ pli.

En 1989 oni mezuris, ke la supra parto estas jam pli ol 4 metrojn el sia ekvilibra linio, kaj la jara kliniĝado atingas 2 mm, duoble tiom kiom antaŭ 50 jaroj! La nunan kliniĝon, spertuloj opinias tro granda kaj danĝera, kaj ili decidis ke la turo plu ne estas sufiĉe sekura por permesi supreniradon. Iuj inĝenieroj certigas, ke la monumento minacas fali sen averto kaj ke la falo estas forte akcelata de la senĉesa vibrado kaŭzata de la intensa ĉirkaŭa trafiko. Kontraŭuloj opinias, ke distanco inter la turo kaj apuda ŝoseo estas tamen sufiĉe longa por absorbi la vibradon, pro la elasteco de la argilo, sur kiu staras la konstruaĵego.

Studoj de inĝenieroj, kunvenoj, paroladoj, pliaj studoj, kunvenoj kaj paroladoj sin sekvis ĝis februaro 1992, kiam fine komencis labori en la urbo internacia komisiono. La studoj kaj diskutoj kompreneble plu daŭras, sed nun jam internaciskale. Jam multaj kaj plej diversaj teknikaj kaj elektronikaj instrumentoj daŭre observadas la sanstaton de la fama turo, plej precize.

Unu el la anoj de la fakula komisiono diras, ke la turo preskaŭ certe falos post 5 ĝis 25 jaroj, ĉar la matematika rilato inter puŝantaj fortoj kaj rezistantaj fortoj troviĝas jam ĉe la ekstremaĵo de toleremo. Spertulo pri tera premo kaj fosado, male diras ke li tute ne povas ion ajn aserti pri la vivodaŭro de la malsanulo; eble ĝi falos morgaŭ aŭ post cent jaroj; la tuta afero estas granda enigmo, kiu ja dependas de la kvanto de akvo en la fundamento kiu malaltiĝas pli rapide ol atendite. Plej optimisma aserto diras, ke la turo starados ankoraŭ pluajn 85 jarojn, eble eĉ 100.

Dumtempe, la pisanoj estas sufiĉe malkontentaj, ĉar dum pli ol tri jaroj ili plu ne ricevas la kutiman nombron da turistoj.

Amador DIAZ

NOSTALGIO

Kanaloj en Britio

Oni pensu pri Venecio kaj oni pensas pri kanaloj. Oni pensu pri Birmingamo, la dua plej granda urbego en Britio, kaj oni pensas pri komerco, industrio, pri ŝoseoj.

Sed tio estas tre erara. Anglio iam havis tre densan retaron de kanaloj, kaj Birmingamo iam havis, eĉ ankoraŭ havas, pli longan kanalsistemon ol Venecio. Ili iras tra la urbo, kruciradas ĉirkaŭ kaj sub la stratoj kaj eĉ tra tiuj fabrikoj kaj var-tenejoj por kies servo ili estis konstruitaj.


Kanaloj, ofte uzante riverojn kiel partojn de sia itinero, portis varojn en longaj mallarĝaj boatoj, du metrojn larĝaj kaj dek metrojn longaj... normo fiksita por facila havenuzo, ŝarĝado, manovrado. Per sistemo de kluzoj, la kanaloj grimpis supren kaj malsupren laŭ montetoj kaj deklivoj, alte trans profundaj valoj aŭ laŭ ties fundo. Malrapida sed kvietaj kaj tre efika rimedo de transportado en multaj el la plej belaj regionoj de Britio. Tiel efikaj, ke eĉ hodiaŭ transportado de varoj per akvo estas malpli kosta ol per fervojo aŭ ŝoseo (se almenaŭ oni ne kalkulas la tempon bezonatan).

Famaj inĝenieroj Telford, Brindley kaj Jessop gajnis vastan renomon pro sia planado kaj plenumo de grandiozaj projektoj. Kun imagoj, lerto, kaj persona strebo, ili kreis akvoduktojn trans vastaj malfermaj spacoj, tunelojn aŭ kluzojn por transiri la montojn, konstruis masivajn pontojn el ŝtono kaj ŝtalo.

La homoj kiuj laboris en tiuj boatoj loĝis dum pluraj generacioj sur la boatoj mem: en loĝospaco nur 3 kubajn metrojn kun edzino kaj tri-kvar infanoj. Tuj kiam la infanoj havis sufiĉan forton ili devis fermi kaj malfermi la kluzojn, direkti la pezajn boatojn, atenti pri la ĉevaloj kiuj per longaj ŝnuroj trenis la boatojn marŝante laŭ la vojeto flanke de la akvo.

Nur en malfruaj tagoj la boatoj ricevis motorojn, kiuj povis movi eĉ du boatojn samtempe.

Sed jam preskaŭ ĉio forestas. Venis la fervojo, pli rapida kun pli granda kapablo. Ŝoseojn oni konstruis kun multege da kamionoj kiuj estas pli variigeblaj. Tre malmultaj el tiuj miloj da akvovojoj nun portas varojn kvan-



La uzmaniero de la kanaloj funde sanĝiĝis: en malnovaj tagoj ŝarĝboatoj veturigis materialojn de unu urbo al alia; en la modernaj tagoj la kanaloj regas la siajn vizitantojn per silento, kvieto kaj ripozo.

kam ĝis 1970, papero estis ankoraŭ transportata de la mezaj regionoj al Londono per longaj boatoj.

Tre multaj kilometroj jam estas senakvaj, plenaj nun de domoj, aŭ ŝtopitaj per rubo, aŭ simple forlasitaj kaj forgesitaj. Tuneloj devis esti fermitaj pro danĝerigo.

Tamen ne ĉio estas perdita. Ĉiuj kanaloj restantaj estas uzataj por plezura kaj feria trafiko. Malpli grandaj boatoj, privataj, troviĝas ĉie. Hoteloj staras kie iam staris var-tenejoj, kaj kie iam staris stakoj da kestoj aŭ feraĵoj nun oni vidas parkojn kaj arbojn. Laboro de volontuloj restaŭras iaman belon kaj malfermas akvon kaj kluzojn kiuj bezonegis ĝisfundan riparon. Eĉ la longajn boatojn oni restaŭras tiel ke ili estas uzataj kiel malgrandaj

hoteloj por dek-duo da pasaĝeroj kiuj irumadas milde tra kampoj kaj arbaroj, trans valoj, sube inter la montoj kaj tra tuneloj restaŭritaj. Homoj lernas ke ili povas funkciigi la kluzojn mem kaj trovi konvenajn havenojn. Pluraj familioj loĝas sur boatoj konstante, kaj se laborhoroj permesas, vojaĝas tra la kanaloj al la plej belaj lokoj laŭ la sezono.

Granda klopodo de inĝenierado, celita al komerco kaj industrio, jam estas grava feria sperto por miloj da homoj kiuj serĉas „alispican” ferion, en freŝa malferma aero, for de poluado kaj bruo. Miloj da kilometroj da kanaloj estas en konstanta uzado tra la tuta jaro, donante al granda nombro da homoj novan aspekton de la vivo.

Will GREEN

La hispana

ESPAÑOL

La hispana, aŭ kiel ĝiaj parolantoj pli ofte nomas ĝin, la kastilia, regas grandegan parton de la mondo kun siaj 320 milionoj da lingvanoj. Preskaŭ tuta Ameriko sude de Usono, krom Brazilo, la Gvajanoj kaj Belizo, ĝin parolas, kune kun, kompreneble, la hejmlando Hispanio, iuj ekskolonioj en Afriko kaj la supera klaso en Filipinoj.

Ja en tiuj landoj ĝi kutime ne estas la unusola lingvo. En la amerikaj landoj la indianoj gardas proprajn lingvojn – en vere dulingva Paragvajo, la *guaraní* estas la dua oficiala lingvo; en Filipinoj ĝi multe perdis fronte al la nacia lingvo *pilipino* (tagala) kaj la angla.

Kaj eĉ en Hispanio mem troviĝas aliaj lingvoj. Apud Francio oni parolas la katalunan, lingve meze inter la franca kaj kastilia, kiu havas propran grandiozan literaturan tradicion. Meze en la nordo, la mistera vaska estas verŝajne malparenca al iu ajn alia lingvo, kvankam ĝi eble prezentas travivinton de la lingvoj parolataj en Eŭropo antaŭ ol la hindeŭropa invado. En la okcidento, norde de Portugalio, oni parolas la galegan, kiu, kvankam konsiderata hispana dialekto, fakte estas speco de la portugala. Kio estas la diferenco inter „lingvo” kaj „dialekto”? Laŭ iu difino „lingvo” estas „dialekto kun mararmeo”.

Ankaŭ ekzistas iuj diferencoj inter la specoj de la hispana diversregionaj. La tradicie plej respektata estis la kastilia, de Kastilio (ĉirkaŭ Madrido). En ĝi oni prononcas „molan” *c* (t.e. antaŭ *e* aŭ *h*) kiel la angla *th* en „thing” (lispa „s”) – en aliaj regionoj ĝi estas [s]. Laŭ bona (sed laŭŝajne bedaŭrinde malvera) historio, tio fontis



de iu reĝo kiu parolis kun lispo, kaj kiun imitis unue la korteganoj, sekve la ĝenerala popolo! Ankaŭ en kastilio oni elparolas // kiel la itala *gl* (kiel kombinaĵo de [l] kaj [j]), sed en aliaj partoj de Hispanio, kaj Hispano-Ameriko (kies prononco fakte fontas en la suda regiono Andaluzio), la kutima prononco estas simple [j].

La hispana estas lingvo de simplaj sonoj, kaj ĝia ortografio tre klare prezentas ĝian prononcon. Tio ne estas diri, ke ĉiuj estas tute kontentaj pri ĝi, kaj estas daŭraj proponoj por ŝanĝoj, kiuj igu ĝin eĉ pli fonetika. Ke leviĝas ĉiamaj demandoj por plibonigo de skribsistemoj, kiuj estas jam pli-malpli taŭgaj (kiel por la iberiaj kaj skandinaviaj lingvoj) povas surprizi tiujn, kies lingvoj ne estas tiel bonŝancaj; mikraj ŝanĝoj al la franca ortografio nun provokas furiozon, kaj verŝajne oni simple rezignis pri la angla. Sendube la nivelo de fonetika konscio estas pli alta inter popoloj kiel la hispanoj.

Kvankam la vokaloj estas klaraj kaj facilaj (samaj kiel en Esperanto), lernantoj ne tuj povas konstati, ke la konsonantoj ne ĉiam estas tiaj. La sonoraj konsonantoj *b*, *d*, *g* povas havi la samajn plosivajn sonojn kiel en Esperanto, sed pli ofte ili iĝas frikativaj, sonoj malpli facilaj por lernantoj. En parolo, finaj konsonantoj ofte malaperas. (Kiel ekzemplo de kiom malsama de la teorio povas esti parola vorto, ni prenu la nomon Pinochet; ĝi devus esti [Pinoĉet] sed en la (iom simila al la franca) ĉilia prononco ĝi estas [Pinoŝe].) Tamen

la hispana prononco ne estas malfacila kaj ne varias grande.

Hispana vortemfazo estas malkonstanta, sed ĝi sekvas klarajn regulojn, do ĝi ne estas problemo. Kiam malregula, oni markas ĝin kun dekstrakorna supersigno. Interesa unikaĵo de la skriba hispana estas ke oni markas ankaŭ la komencon de demando aŭ ekkrio per inversigita signo: *¿Qué hora es?* (Kioma horo estas?) Kial neniu alia lingvo faras same?

Ankaŭ en gramatiko la lingvo estas relative facila por komencanoj – nur kiam oni atingas avancen etapon ĝi iĝas komplika.

Substantivoj havas du arbitrajn genojn, vir- kaj in-genran, sed ne estas malfacile diveni, pri kiu temas (la plej oftaj finaĵoj estas respektive -o kaj -a). Por ambaŭ, la plurala finaĵo estas -s, same kiel por artikoloj, adjektivoj kaj pronomoj. Substantivoj ne havas kazojn; ĉiujn rilatojn esprimas prepozicioj, eĉ la akuzativon (por personoj, ne objektoj: do „*Perdí a mi hija*” = „Mi perdis mianfilinon”, sed „*Perdí mi paraguas*” = „Mi perdis mian pluvombreton”.)

Adjektivoj devas kongrui kun siaj substantivoj ne nur laŭ nombro (-s) sed ankaŭ laŭ genro (denove, kutime -o kaj -a respektive). Sed lokigi adjektivojn rilate siajn substantivojn estas ioma malfacilaĵo. Ili povas troviĝi ĉu antaŭ, ĉu malantaŭ ili. Se oni elektas fuŝe, tio ĝenerale ne estas granda katastrofo; sed foje la pozicio ŝanĝas eĉ la signifon de la adjektivo, ekzemple: „el gran rey” = „la

granda reĝo"; „el rey grande” = „la alta reĝo”. Ĝeneraligante, en la pli ofta posta pozicio ili havas senmetaforan signifon; antaŭe la sama adjektivo povas havi abstraktan signifon.

La hispana havas kvar formojn por la difina artikolo (*la mano*) kaj nedifina artikolo (kiu ne ekzistas en esperanto: „mano”): por ambaŭ genroj, singularo kaj pluralo. Ili estas jenaj: el (hazarde, sama kiel en iuj arabaj dialektoj), *la, los, las; un, una, unos, unas*. Ankaŭ estas restaĵo de la latina neŭtro, alie malaperinta, en plu difina artikolo *lo*, kiu prezentas tutan ideon: „*lo difícil*” = „tio, kio estas malfacila”.

Hispanaj verboj iĝis pli komplikaj ol en la prapatra latina. Multaj verbo-tempoj nun formiĝas kun helpverboj. Ekzemple „Mi estas parolinta” tradukiĝas „(Yo) he hablado”, uzante parton de la helpverbo *haber*. En lingvoj kiel la franca, germana kaj angla, oni utiligas por fari tion „havi” kiel helpverbon, sed la hispana havas tiun apartan vorton. La hispana verbo por „havi” estas *tener*, kiu ankaŭ signifas „teni”.

Ankaŭ havas la hispana du vortojn por „esti”. Ĝenerale *estar* signifas kelktempan ekziston, *ser* daŭran. Sed estas iuj paradoksaj uzoj: Oni diras „*Montevideo es la capital del Uruguay*” (Montevideo estas la ĉefurbo de Urugvajo) uzante *ser*, sed „*Montevideo está en el Uruguay*” (Montevideo estas en Urugvajo) uzante *estar* – malgraŭ ke, kvankam Montevideo eble ne estos ĉiam ties ĉefurbo, ĝi ĉiam lokiĝos en Urugvajo! Sed la du verboj ofte ebligas utilajn distingojn maleblajn en aliaj lingvoj.

Ĝenerale, ĉiu pronomo havas konforman verbfinaĵon, do verboj plej ofte aperas sen pronomoj. Nur en la „tria persono” povas esti problemoj, ĉar ĝia verbfinaĵo utiliĝas ne nur kun *él/ella* (li/ŝi), sed ankaŭ kun la ĝentila vorto por „vi”, *usted*, kiu derivas de „*Vuestra Merced*” (Via Moŝto). Sed se la situacio ne evidentigas la pronomon, oni povas ĉiam enmeti ĝin. Pro la sama kialo, la posesiva pronomo *su*, kiu prezentas kaj „lian” kaj „vian”, povas esti dusenca. Por eviti malklarajn frazojn kiel „(Ella) tiene el sombrero de usted” = „Ŝi havas la ĉapelon de vi (vian ĉapelon)”.

Mankas multaj neregulaj verboj en la hispana, kaj eĉ el tiuj ĉi multaj estas pli ĝuste ekscentraj² ol neregulaj. Oni facile akiras lerton pri kiel uzi ilin ĝuste.

Ĉu oni povas elekti la plej tipe hispanan vorton? Plej (fi)famas inter eksterlandanoj „mañana”, kiu povas

signifi „morgaŭ” – aŭ iam ajn post tiam! Tamen tiu elekto apenaŭ estas justa al la dinamika moderna Hispanio. („Mañana” certe ne estas tiel nebula kiel la hindia vorto *kal*, kiu povas signifi aŭ „morgaŭ” aŭ „hieraŭ” (kio eble diras ion pri la hinda cirkla koncepto de la tempo!) Kaj oni malfacile imagus germanon (ekzemple) dirante „*espero el tren*” („mi atendas la trajnon”, aŭ laŭvorte „mi esperas la trajnon”!).

Krom prononcaj, ekzistas vortaraj diferencoj inter la diversaj hispaneparolantaj landoj. Ekzemple *bocadillo*, kiu estas en Hispanio sandviĉo, estas en Kolombio gujana bonbono. Sed parolanto baldaŭ sin orientas en la dialekto de kiu ajn regiono, en kiu li/ŝi troviĝas.

La hispana estas ege utila lingvo kiu malfermas al parolanto vastan parton de la mondo. Ĝi estas ideala por studantoj, ĉar ĝi estas sufiĉe facile lernebla, logika, havas majestatan kaj klaran prononcon, vortaron proksiman al la latina do tre internacia (kaj ne malsimila al Esperanto), kaj estas perilo por mirinda literaturo. En la estonteco ĝi estos eĉ pli grava mondlingvo, kaj neniu alia liveras al lerninto tiel rapide tiel grandajn rekompencojn.

Bradley KENDAL

1. mikraj = etegaj
2. ekscentra = eksterkutima

LIBROJ

Por forigi antaŭjuĝojn

En la lastaj jaroj aperis pluraj sciencaj verkoj pri interlingvistiko kaj Esperanto en la germana lingvo. La apero de tiuj verkoj estas grava afero por nia movado, ĉar tio donas prestiĝon al nia lingvo. Multaj lingvosciencistoj, kiuj esprimis sian opinion pri Esperanto, neniam lernis ĝin, kaj tial fakte ne kompetentas. Pro la fakto, ke lingvosciencistoj deziras informiĝi pri lingvoj sen devi lerni ilin, nacilingva literaturo grave kontribuas al la malapero de antaŭjuĝoj.

Sen troigi, mi povas aserti, ke jen ni havas gravan ĉefverkon, kiun lingvosciencisto, kiu volas studi la fenomenon de lingvo-evoluo en Esperanto, nepre devas legi. Germanlingva lingvosciencisto, kiu volas aserti ion pri Esperanto kaj nek studis la lingvon nek legis tiun ĉi verkon de Benoît, ne povas esti konsiderata serioza.

La enkonduko donas bonan kaj koncizan superrigardon pri la Esperantologio kaj tiel kontribuas al la forigo

de oftaj antaŭjuĝoj. Estas fakto, ke momente nacilingva pri-esperanta verko ne povas malhavi tian enkondukon, ĉar ni devas supozi, ke la scioj de ordinara lingvosciencisto pri Esperanto estas nulaj aŭ eĉ eraraj. La spertaj esperantistoj simple ellasu la unuajn 27 paĝojn, kaj eklegu de paĝo 28.

Sub la ciferoj 1 ĝis 1.3 Benoît prezentas la lingvon en por lingvo-sciencistoj digestebla maniero. Ankaŭ tiu parto sin malpli turnas al la fakulo ol multe pli al la malesperantistoj. Benoît liveras al ni precipe sub cifero 1.3 gravajn argumentojn por la egaleco ja supereco de Esperanto rilate la etnajn lingvojn. La mankanta analogio en la etnaj lingvoj enkarcerigas la kreivecon de la homo. Benoît emfazas, ke „kontraŭe al la plej multaj planlingvo-aŭtoroj Zamenhof ne subiĝis al la iluzio, ke unu sola homo povus krei lingvon”. La tuta ĉapitro 1.4 donas respondojn al la demandoj kiel el projekto iĝis vivanta lingvo, kaj kial Esperanto kaj ne alia planlingvo sukcesis.

La verko kiel tuto meritas nepre la atenton kaj de la lingvo-sciencistoj kaj de la esperantistoj.

La verko donas unikan priskribon de la fonetika, gramatika kaj vortara evoluo de Esperanto, kaj empirie pravas, ke nia lingvo estis en la tuta mondo kohera kaj male al aserto de multaj lingvo-sciencistoj ne dialektigis.

Benoît pretendas en ĉapitro 0.6, ke sia enketo estas pure priskriba. En tio li sukcesis, kaj liaj observoj estas pravaj kaj objektivaj. Unusolan punkton sur la pli ol 300 paĝoj mi povis kritiki. Temas pri la listo de la el la angla prunteprenitaj vortoj. Tie aperas radikoj, kiu estas nek PIVaj nek almenaŭ laŭ miaj scioj konataj en Esperanto. La fakto, ke iu ajn aŭtoro foje uzas fremdan radikon, ne pravigas ties listigon en scienca verko. „Hat” ekzemple tute ne aperas en Esperanto kaj „skat” signifas „kartludon” (laŭ PIV) sed ne „glidŝuon”. Tiu detalo tamen ne senvalorigas tiun ĉi tre ampleksan verkon, kiu meritas la predikaton „nepre leginda kaj legenda”.

Dietrich M. WEIDMANN

Philippe Benoît, *Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto*. Konstanz, 1991.

Dum la enpaĝigo de la teksto „La rusa” en la aprila numero, okazis fuŝo, kiun certe ĉiuj legantoj de la artikolo rimarkis. Kiu deziras ricevi ĝustan version povas peti senkoston ekzempleron ĉe la eldonejo. Ni pardonpetas.

Historia romaneto

La fronta kovrilo – aĉa, seninteresa kaj oscediga. La eldonistaj vortoj sur la dorsa kovrilo – nenidiraj linioj verkitaj de stila kaj lingva komencanto sen eĉ plej eta scio pri la reklama arto. La peto de la tradukinto sur la nula paĝo, ke danaj kaj germanaj legantoj ne ofendiĝu – nenecesa, ĉar evidenta, kaj do misefika. Kaj la unua paĝo de la teksto mem – stumbla kaj seka.

Tamen jam de la dua paĝo legeblas interesa rakonto aŭ romaneto pri la ribelo de estonaj kamparanoj kontraŭ la germanaj kaj danaj regantoj kaj feŭdestroj de Estonio en la georga tago de la jaro 1343. Kvankam konvenus al la traduko ankoraŭa stila revizio por forigi kelkajn strangaĵojn, mi rekomendas tiun ĉi libron al legantoj de facila, senpretenda prozo. Postparolo asertas, ke „apud *Kalevipoeg* ĝi estis la plej influa libro en la estona literaturo” en la periodo de nacia vekigo, en la 19a jarcento. Kaj ke ĝi „instruas arde malami subpremado kaj sklavecon, kreskigas amon al la libero, patriotismon kaj heroismon”. La aŭtoro, Eduard Bornhöhe (1862-1923) aperigis sian verkon en 1880. La tempo preterfluis rimarkeble ĉi tian beletron. Troa insistito pri kolektiva identeco, personigo de interluktantaj popoloj, forto-kulto, koncepto pri landoj kiel nepre unuetnaj ujoj – jen parto el multo jam velka, ideologie mucida, karakteriza de tiu ĉi *Venĝanto*.

Georgo KAMAĈO

Eduard Bornhöhe. *Venĝanto*. Tradukis el la estona Valev Kruusalu. Eldonis: Mendoservo, Hyvinkää, 1990. 118 p. ISBN 951-96076-2-5. Prezo ĉe FEL: 450 BEF + afranko; ĉe UEA: 24,60 NLG.

Faktojn refutas teorio

Ne, kara leganto, la titolo ne misuzas la akuzativon. Unu el la famaj ironiaj „leĝoj de Murphy” [Mefi] diras ke, kiam faktoj ne konfirmas teorion, ili devas esti forigitaj. Oni emas pensi ke temas nur pri vortludo, sed ŝajne tio okazas ne malofte. La libro temas ĝuste pri iu okazaĵo kiam, laŭ la aŭtoro, la oficialaj sciencistoj kaŝis veran arkeologian malkovron, kiu renversus akceptitajn teoriojn pri la origino de la skribarto, kaj do de la kulturo mem. Ne la fenicoj estus inventintoj de la alfabeto, sed ĉi tiu

havus originon pli antikvan, kaj ne en Oriento, kiel oni kutimas instrui, sed en Eŭropo.

Per lerta lingvouzo kaj miriga amaso da dokumentado, fontanta sendube el ne improvizita serĉlaboro, la aŭtoro devigas nin provizore jesi al lia hipotezo, kun la nura (!) rezervo, ke eble la argumentoj de liaj oponentoj povus esti egale bonaj.


La aŭtoro ŝajne tre malŝatas kristanismon, biblion kaj eklezion, ĉar fojon post fojo memorigas la fakton, ke en la tempo, kiam oni emis laŭvorte tiri sciencajn konkludojn el la biblio, gravaj eraraj asertoj estis faritaj de la oficialaj sciencistoj, nome la teologoj (ekzemple, pri la fama klasifiko de la leporo inter la remaĉuloj).

Cherpillod ne estas diletanto pri verkado en Esperanto, kaj la libro spegulas lian lertegan plumon. Nur iom ĝenas la abundo de neglositaj nepivaj¹ vortoj. La asterisko apud ili certe ne anstataŭas signifoklarigon, kvankam por fakuloj (kaj iagrade por iom kleraj homoj, eĉ se nefakuloj) multaj radikoj estos jam konataj.

Daniel A. COTARELO GARCÍA

1. Nepiva (slango): kiu ne troviĝas en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.

André Cherpillod: *Glozel kaj la prahistoria skribo*. Eld.: la aŭtoro, 1991. 134p. ISBN: 2-906134-16-3. Prezo ĉe FEL: 540 BEF + afranko, ĉe UEA: 29,70 NLG + afranko.



Ek al l' atak'

Jus aperis *La vunda punkto*, ankoraŭ unu pamfleto el la plumo de Richard Schulz, kiu minace skuas sian lancon antaŭ la nazoj de ankoraŭ du esperantistoj, William Auld kaj Benoît Philippe. La unua parto de la broŝuro portas la titolon „Publika letero al la antaŭparolinto de la NOVA ESPERANTA KRESTOMATIO.

„Amara reago” estiĝis ĉe Schulz, ĉar en tiu teksto Auld, sen menciigi la nomon Schulz, skribis pri pedantulo, harfendemulo kaj erumanto, kies celo estas „priĉikani verkojn en Esperanto”. Schulz ja komprenis ke la skota bardo celis lin. Lia defendo konsistas en enuige detalita „priĉikanado” de tuta paĝo de la „Antaŭparolo” por provi konvinki legantojn, ke la lingvouzo de Auld ne konformas al la normoj de Esperanto, kiel starigitaj de la Analiza Skolo.

La dua parto de *La vunda punkto* titoliĝas „Esperantologiaj konsideroj pri eraraj kaj erarigaj esperantologiaj konceptoj”, kaj ŝajnas esti recenzo de la germanlingva doktoriĝa tezo de Benoît Philippe, kies temo estas lingvoŝanĝigo en planita lingvo, klarigita per Esperanto¹. Tamen, anstataŭ objektiva taksado de la enhavo de la 362-paĝa publikigita universitata disertacio, Schulz uzas tiun verkon kiel pretekston por frapi sur la kapon de la aŭtoro per sia jam fendita lanco. Schulz rifuzas akcepti la tezon de la germana lingvisto, ke Esperanto estas vivanta lingvo same kiel la angla, franca kaj germana, kaj pro tio povas evolui sammaniere. La korifeo de la Analiza Skolo vane provas refuti tiun vidpunkton per ĝisnaŭza ripetado de mallarĝmense formulitaj doktrinoj.

Legantoj, kiuj jam konas antaŭe publikigitajn verkojn de Schulz, ne renkontos novaĵojn en lia argumentado. Efektive, la konceptoj kiujn li prezentas, ne estas liaj originalaj elcerbaĵoj. Plurloke en la recenzata libreto estas menciita Ludoviko Mimó, el kies skribaĵoj Schulz ofte citas. La Analiza Skolo, aŭ pli ĝuste, la mimoismo, estis fondita antaŭ tri jardekoj de esperantisto el Sabadell kiu verkis kelkajn librojn kaj poste formalaperis en la abismon de forgeso.

Okaze de la publikigo de *La vunda punkto*, mi havas la impreson, ke la Analiza Skolo/mimoismo jam transpasis sian apogeon kaj nun montras tiom da negativaj trajtoj, ke ĝi neeviteble estas survoje al dekadenco.

Bernard GOLDEN

Rikardo Ŝulco (ps. de Richard Schulz): *La vunda punkto*. Eldonis: Esperanto-Centro, Paderborn, 1992. 32p. ISBN: 3-922570-74-7. Prezo ĉe UEA: 7,50 NLG + afranko. Ne akirebla ĉe FEL.

1. Recenzon pri la verko de Benoît Philippe vi trovas en la rubriko LINGVO, antaŭ la rubriko LIBROJ.

de Poul Thorsen

Funga fuŝo

Aŭtune kun korbo kaj tranĉilo mi ĉiam povas sensuspekte pasi tra la arbaroj - ankaŭ ekster ĉiu pado.

- Fungisto! oni pensas, kaj kelkiuj pli malpli diskrete proksimiĝas, foje por havi kontakton pretekste de scivolemo aŭ miro, foje por aroganti pli bonan scion rilate al la kolektitaj specimenoj. Povas tiam okazi, ke inter veproj mi trovas ion tute alian ol fungojn: ŝiritan vestaĵon, dube perditan - sed feliĉe ĝis nun neniam kadavron malkovris.

Kaj tamen. Por allogi flugantajn insektojn iuj fungoj povas fetori ĝuste kiel kadavro, ekzemple *Phallus impudicus*, Faluso impertinenta, kiu levas sian abomenan ŝliman glanon inter kaj abioj kaj foliujoj. Tiam estas kvazaŭ Morto embuskas.

Mi ne konsideras min micetologia eksperto, nur ludas la rolon de sperta amatoro, sed pli ol unu fojon entuziasmigis min penetri en la fungan universon. Ne eblas resti indiferenta al ties belegaj kaj strangaj aperaĵoj, ofte kun horora allogo preter la limoj de ĉia racio kaj utilismo.

Aŭtunan posttagmezon amiko mia, kuracisto praktikanta, vokis min telefone:

- Aŭdu, en mia konsultejo troviĝas persono iom delira, proksima al paniko. Unue mi havis la impreson, ke kulpas alkoholo, kaj efektive li konfesis, ke li trinkis iom da vino - propradire ne tre, kaj nur kun la hejma manĝaĵo. Li loĝas sola kaj preparis por si mem el skatolo stufitan bovaĵon. Legome li manĝis fungojn, 'sovaĝajn' post kolekto en arbaro. Nun li tremas pro timo, duone sentas sin morta, eĉ se fizikajn dolorojn ne havas. Ĉu vi eble povas tuj veni por asisti al mi kaj al hospitalo por determini la fungojn?

Kiam mi atingis la konsultejon, la paciento - mezaĝa viro, jam ne estis tie, sed ja lia vomajo. Ĝi tre bone atestis, ke temas pri fungorestaĵoj. Ni rapidis al lia hejmo por se eble el la rubujo savi pli da evidentiga materialo.

Relative facile estis konstati, ke ekskluzive temis pri *Coprinus atramentarius*, Inkofungo ordinara, el kiu fluas inkaĵo kiam matura. Objektive ĝi neniel minacas la vivon, sed ĝuste tiu fungo distingas sin per enhavo de la *antabusulfido*, kies efekton oni en kelkaj landoj kaj medioj aplikas kontraŭ alkoholismo.

Simpla klarigo estas, ke kemiaĵo en la

inkofungo - kaj ankaŭ en sinteze farita medikamento - kune kun plej eta kvanto da alkoholo kaŭzas ĉe la „ĝuinto“ ŝviton, korimpeton, kapdoloron, naŭzon kaj vomemon. Tiel unu tablojdo - pli malpli libervola - devigas nepran alkohol-abstinon ĝis unu semajno.

La kazo ŝajnis klara, kaj cetere la hospitalo jam anticipis per elpumpo kaj injekto de atropino kontraŭvenena. Al mia rimarko, ke la fungo en si mem ne estas danĝera, kaj ke sekve kuracado superfluas, venis dokta respondo de la ĉefkuracisto, ke do mi pli bone scias ol la medicinistoj:

- Ĉu mi ne aŭdis pri psikosomataj efikoj? Neniam suferis stomakdoloron pro timo? Ruĝiĝis aŭ ŝvitis pro embaraso? La paciento suferas paralizon pro ŝoko. Sole timante morton pro fungoj li estis en vivdanĝero. Kiam li rekonsciigis, nur necesos nervomedicino trankviliga, kaj li estos normala.

Tiel longe, tiel bone, aŭ pli ĝuste: nebone. Ĉar unu enigmo restis. Forlasante le pacienton mi konfuziĝis pro seka informo, ke *li estas blinda!* Ĉu vere blindulo kolektas fungojn? Ŝajnas absurde. Tamen li klare informis la kuraciston, ke li ne nur manĝis, sed ankaŭ kolektis fungojn en arbaro.


Nu, oni aŭdis, legis pri nekredablaj kapabloj de nevidantoj. Kelkaj rekorde naĝas, ŝakludas, biciklas, skikuras, kaj mi ne scias kion, sed ĉu vere eblas, ke tiaulo iras por serĉi fungojn? Manĝi kun alia fungojn, jes, kvankam verdire povas danĝeri, sed sole vori nevideblajn sovaĝaĵojn? Se tiel, nur povas esti speco de ludo kun ruŝa ruleto.

Kurioza provo de suicido? Temas ja pri homo kun nefeliĉa sorto. Sed kial elekti ĝuste tian metodon, konsidere la riskon de doloro kaj necerteco? Tro originale.

Delonge estas klare, ke li manĝis sola, sed certe oni devas konkludi, ke ne estas fizike eble por blindulo fungojn mem elekti kaj kolekti. Iu akompanis tra la arbaro. Sed kiu? Se estas indicoj direkte al krim-intenco, nepre estos unika kazo en la kriminala historio, kaj do polico intervenu. Neeltenebla penso. Polico certe eĉ pli ol medicinistoj fuŝos la aferon.

Kun korbo kaj tranĉilo mi pretigis min por promenado tra la arbaro proksima al la hejmo de l' blindulo.

Najbarino lia deklaris, ke la kompatindulo ne havas parencojn nek amikojn. Tamen ne tute solas, ĉar li neniam forlasas la hejmon sen gvido de sia hundo. Ĝi estas bela besto, kiu pacience atendas, ĝis haltas la trafiko, kaj ofte



ĝi portas dorsosaketon kun lunĉo por pikniko.

- Ĝia nomo estas Lupo, kaj cetere ĝi malaperis post la enhospitaligo de sia mastro.

En la arbaro ne estis vepro, nur vojetoj bone zorgitaj. Baldaŭ mi konstatis abundan kreskon de la fifama inkofungo - en facilatingebla tereno.

Kelkaj infanoj proksimiĝis al mi. La korbo trankviligis ilin, kaj mi kiel kutime montris mian predon. Ĉiam precipe la koloroj tre mirigas. Kun vigla knabo 11-12jara mi interparolis:

- Ĉu vi konas la inkofungojn?

- Ho jes, estas amuze ŝmiri nigre la knabinojn per ili.

- Ĉu eble vi ankaŭ konas la blindulon, kiu kelkfoje venas ĉi tien kun sia hundo?

- Jes, estas Lupo. Ni bone ludas kun ĝi, ĵetas branĉon aŭ ŝtonon, kaj ĝi revenas, revenas kun ĝi.

- Ĉu vi scias, ke Lupo malaperis?

- Kompreneble. Ĝi ĉirkaŭkuris sola, ĉar la blindulo forlasis ĝin. Ili diris, ke al hospitalo. Ĝi jelpis, jelpadis, kaj tiam en alia strato kelkaj aliaj knaboj kaptis kaj retenas ĝin. Ĝi ne plu mal-satas. Ni donas al ĝi por manĝi kaj trinki.

- Mi havas por vi ĉiuj glaciaĵon, se vi rakontas, plene, kio okazis en la arbaro, kiam lastfoje la blindulo estis ĉi tie.

- Juhu! Do, jene, plene. Petro kaj mi ludis tre bone per branĉoj kun la hundo. La blindulo sidis tie, tre bonhumora. Tiam Lupo freneziĝis kaj komencis gluti fungojn.

- Inkofungojn? Ĉu multajn?

- Je-es, ĉar Petro kaj mi ĵetis kaj ĵetis kaj incitis, ke Lupo revenu kun ili. Tiam post sia lunĉo la blindulo diris: Jen kelkaj moneroj. Pluku por Lupo kaj mi faskon da bonaj fungoj. Ne povas ili esti danĝeraj, ĉar Lupo denove kaj denove voras ilin.

- Ĉu vi nun diris la tutan historion?

- Nature mi faris, plene. Laste ni kune iris al la glacibudo, kaj mi vidis, ke la blindulo aĉetis por si vinon.

- Kaj la hundo?

- Vi scias, ke hundo ĉiam trinkas nur akvon...

1. micetologio = scienco pri la fungoj

2. suicido = memmortigo

Zairio antaŭ 30 jaroj

En la pasinta numero, Edward Symoens rakontis pri siaj spertoj rilate la sendependiĝon de Kongo. Jen dua parto pri la unuaj monatoj post tiu sendependiĝo.

Reveno post la sendependiĝo

Mia intenco ne estas rakonti la historion de la juna Demokrata Respubliko Kongo, sed kiel mi jam diris, rakonti pri miaj propraj spertoj kaj travivaĵoj kiel observanto kaj, en unu eta sektoro, kunludanto.

Por ke la leganto tamen komprenu mian sintenon kaj postan decidon, mi ne pre devas skizi la ĝeneralan situacion kaj etoson en la lando, kiun mi antaŭ nelonge estis forlasinta kun la intenco reiri tien post mia normala dumonata feriado. Sed, kiam mi aŭdis pri la aĉaĵellasaĵoj de la politikistoj kontraŭ mia lando, mi decidis resti en Belgio, kaj tie kandidatiĝi por posteno de lernejestro en la ŝtata instruado.

Mi jam komencis la unuajn paŝojn, kiam mi ricevis telegramon el Kongo, de la provinca ministro pri instruado, Mabusa, kiu petis min tuj returniĝi al mia posteno kiel lerneja direktoro. Post longa hezito kaj diskutado en la familio, per ĉiuj argumentoj por kaj kontraŭ, mi telegrame respondis: kon-

sentite, se mi povas labori profesie kiel antaŭ la sendependeco, en kompletaj libero kaj digno. Mi ricevis konfirman konsenton pri miaj kondiĉoj.

En septembro, la provinca ministro Mabusa kun sia belga konsilanto, malgraŭ malpermeso de la nacia, federacia ministro pri edukado, kaŝe venis al Belgio por konvinki la estintajn geinstruistojn reiri al Kongo. Li plene sukcesis, precipe kiam oni eksciis, ke ankaŭ mi reirus kiel lernejestro.

Mia edzino ne akompanis min; mi unue esploris la situacion surloke. De miaj ses infanoj, kvar restis en Belgio por daŭrigi siajn studojn.

Kiam mi alvenis en Kongo, unue frapis min en la flughaveno, kaj poste survoje al la urbo, la granda nombro da „blukaskuloj”.

Post mia instalado en hotelo, mi tuj veturis al mia lernejo, kie en mia oficejo mi trovis kanadan kolonelon: la lernejo parte estis okupita de soldatoj. Post iom da babilado kaj reciproka informado, la kolonelo diris al mi: „Permesu ke mi akompanu vin por viziti ĉiujn partojn de la lernejo, ĉar eble

estas danĝere por vi, belgo, iri sola ekstere.”

Survoje al unu el la multaj konstruaĵoj (la lernejo ja okupis 22 hektarojn), alkuris al mi nigrulo kaj forte gestis (la kolonelo jam iom timis) kaj ĵetis sin sur siajn genuojn kaj respektoplene premis miajn manojn kriante: „Dankon, dankon, ke vi revenis, ni atendis vin.” Li estis unu el la dudek laboristoj en la lernejo. Kvazaŭ sur piedoj flugilhavaj, mia reveno estis diskonigata. La tamtamo plenplene funkciis!

La sama sceno ripetiĝis plurfoje en kelkaj minutoj. La kolonelo, pli ol mirigata pro la sceno, kiun li ĵus partoprenis, diris iom seniluziigita: „Mi konstatas, ke ne necesos protekti vin! Mi ne komprenas, post ĉio kio okazis dum la lastaj semajnoj.”

Mi provis klarigi al li kiel la sendependeco estis efektivigita, ĥaose kaj sen serioza preparado, ke la t.n. „ordinara” popolo jam tuj estis spertinta, ke sendependeco ne signifas „ĉielon sur tero” kaj fidis, ke la „blankuloj” kapablos ordigi la malfeliĉegan situacion, kaŭzitan de tiu *dépendance* (dependeco!). Ĉar la „ordinara homo”, kiu ne komprenis la vorton *indépendance* (sendependeco), uzis kaj komprenis nur la bazan vorton. Tre ofte oni aŭdis diri: „Kiam finiĝos tiu *dépendance*? Ili ja kredis ke temas pri transira situacio, iu politika provizora aranĝo.

Jen la fono, en kiu komenciĝis mia laboro. Mi baldaŭ renkontis miajn helpsekretarion, tajpiston, kasiston, kaj ĉiuj estis same feliĉaj, ke mi revenis.

Ek al la laboro

Mi komencis inventari la situacion; trakti kun la UN-delegacio por komplete kaj urĝe liberigi la lernejon; ekzameni la liston de novaj enskribintaj lernantoj, kaj tio timigis min. Se estis proksimume 250 severe selektitaj afrikaj gelernantoj antaŭ la 30a de junio, mi nun nombris sur la listoj... pli ol 2000! De kie ili venis? Surbaze de kiu atestilo aŭ diplomo? Kiom ili pagis al kiu? Mi troviĝis en tute nekonata situacio, kaj mi certe bezonos iom da tempo antaŭ ol scii kion fari kaj kiel agi.

Mi retrovis kelkajn amikojn kaj konatojn, virojn, ĉar plej multaj blankaj virinoj kaj infanoj forestis. La situacio en la urbo estis trankvila; fakte oni ankoraŭ ne rimarkis grandan ŝanĝon, nur ke estis multe malpli da blankuloj. La samaj butikoj vendis la samajn varojn, kaj tio daŭros dum preskaŭ unu jaro, ĝis elĉerpiĝo de la grandegaj stokoj, kiuj ekzistis en la antaŭa kolonio. Pre-



Mabusa, ministro pri edukado, kaŝe venis al Belgio por paroli kun Edward Symoens, verkinto de tiu ĉi artikolserio. Jen sinjoro Mabusa kun la edzino de Symoens.

cipe la UN-soldatoj el afrikaj landoj aĉetis por si nekonatajn varojn.

Belgio restas „teknika konsilanto”

Precipe en la administracio la politika ŝanĝo videblas kaj konkretiĝas. En la aranĝo inter belgoj kaj la novaj afrikaj potenculoj oni provizore ne antaŭvidis tujan anstataŭadon de la belgaj funkciuloj. Ĉi tiuj edukos afrikajn homologojn kaj iom post iom forlasos sian postenon aŭ restos kiel „teknikaj konsilantoj”. Sed la armea ribelo kaj la el-lasajoj de la politikistoj komplete malordigis la belajn, tro raciajn planojn kaj renversis la situacion.

La fuĝo de granda parto de funkciuloj kreis vakuon en ĉiuj servoj de la administracio, kaj ĉiu liberigita seĝo estis okupata de „iu” ajn. Tiu povis esti skribisto, tajpisto, purigisto, aŭ iu ajn el la pli kapablaj sekretarioj aŭ aliaj kunlaborantoj de antaŭa blanka „ĉefo”. Kelkfoje, en iu servo restis iu belgo, kiu konsentis daŭrigi sian laboron kiel konsilisto de la nova improvizita oficestro; sed ĉiam tio okazis nur laŭ-

hazarde. La modele funkcia kolonia administracio, – laŭ multaj postaj objektivaj atestoj –, iĝis ĥaosa, senefika kaj post 30 jaroj tiu situacio iom, sed apenaŭ pliboniĝis kaj ĝi estas, i.a. la kaŭzo de multegaj malfacilaĵoj, kiujn la respubliko spertis kaj daŭre spertas.

En tiu unua periodo post la sendependiĝo konstatigis kelkaj marĝenaj, sed tamen tipaj trajtoj de ne-adapteco de popolo al la nova situacio. Mi vizitis mian antaŭan domon, nun okupitan de funkciulo el iu ministrejo, por vidi ĉu mi povus rehavi kelkajn personajn posedaĵojn. Ĉar mi nur feris, mi postlasis ĉiujn miajn privatajn aferojn en la domo. Mi ja intencis reokupi ĝin post miaj ferioj.

Miajn personajn aferojn mi ne trovis tie, sed ĉe najbara amiko. Mia domservisto, nia *boy* estis akurate savinta ĉion! Mi deziras ĉi tie honori lin kaj multajn kolegojn liajn, kiuj tra la tuta lando fidele defendis la posedaĵojn de la fora „mastro” aŭ „patrono”. Ofte ili profunde sopiris al la baldaŭa reveno de siaj mastroj.

Tiun sintenon oni povas klarigi tiel, ke fakte, la servisteco estis socia lernejo, en kiu nespertaj viroj kaj virinoj lernis mastrumi, organizi, kuiri, flegi infanojn, kion signifas higieno, ktp.

Kolonia heredaĵo

La ĉiutagaj kontaktoj kreis fidon kaj bazon de plia evoluo. Eksterstarantoj malfacile komprenas tian situacion, kaj pensas nur pri ekspluatado, malmultekostaj domhelpantoj. Kelkaj misuzoj tute ne kompromitas la pozitivajn aspektojn de la servistaro en tiuj landoj; tion oni devas scii por kompreni la grandan fidelecon de preskaŭ ĉiuj tiamaj servistoj. Ili tute ne konsideris sian situacion malsupera, male, ili plej ofte fieris pri ĝi!

En la urbo prezentiĝis kelkaj amuzaj aspektoj de la nova situacio. Policistoj, ĵus enoficigitaj, sen kia ajn trejnado, haltigis sen ŝajna motivo aŭtomobilistojn, petis plej serioze „la paperojn”, kaj tre serioze kontrolis ilin... inverse, fundosupre. Ili ja ne povis legi. Biciklantoj havis plurajn retrospegulojn kaj



Ministro Mabusa: „La lernejoj rezultoj estu kiel eble plej bonaj kaj altaj por progresigi mian landon.”

sonorilojn sur la stirilo kaj ofte portis okulvitrojn... sen vitroj!

Mi scias ke tiuj aferetoj ne gravas. Ili nur pruvas ke la popolo, malbone kaj ridinde, imitis laŭ karikaturna maniero la blankulojn, precipe eksterulojn.

Kiam sufiĉe da instruistoj estis revenintaj, mi proponis al la ministro malfermi la lernejon en la komenco de oktobro, sed mi avertis lin, ke mi regule, laŭ striktaj objektivaj kriterioj, estos devigata forigi gelernantojn, kiuj ne estas kapablaj sekvi la kursojn, ke tiu nombro povus esti tre granda, pluraj centoj, ke mi klopodos fari tion sen provoki tumulton ĉe la lernantaro aŭ la gepatroj. Li konfirmis denove sian kompletan fidon al mi. Li postulis nur, ke la lernejoj rezultoj estu kiel eble plej bonaj kaj altaj por progresigi sian landon.

La plej gravaj problemoj koncerne la lernantojn estis jenaj. Ili estis multe tro aĝaj kaj ne kapablis sekvi la koncernan studaron. La normala aĝo de lernanto en duagrada lernejo estas 12-18. Mi jam antaŭ sendependeco akceptis diferencon de 4 jaroj, ne pli. Ni organizis simplajn kaj plej facilajn skribajn testojn por iom orienti la lernantojn en unu aŭ alia klaso, sed tio ne estis simpla, ĉar la tagon de la testo, ofte venis ne la lernanto mem, sed la pliaĝa frato, aŭ kuzo, aŭ iu alia klanano por ekzameniĝi. Ni tute ne konis ĉiujn tiujn novajn enskribiĝintojn kaj estis neeble rekonu ilin. Ili transdonis la enskribilon kaj do rajtis eniri la ekzamenejon. Nur poste, korektinte la provaĵojn, oni malkovris la anstataŭigon, ĉar pluraj sukcesintaj kandidatoj eĉ ne kapablis skribi sian nomon.

Rakontinte tion al maljuna pastro, tiu konfirmis, ke tio ofte okazas, kaj ke pro tio ili kelkfoje, por seriozaj enirtestoj, unue pesas la kandidatojn kaj repesas ilin antaŭ ol ili faras la teston. Nekredeble sed vere!

Alia pensmaniero!

La leganto povas diri: „Sed, ja ekzistas identiga karto, geedziĝa libreto en kiu troviĝas la nomoj kaj naskiĝdatoj de la infanoj.” Tio estas vera, sed... plurfoje mi akceptis patron por enskribi lian infanon. Mi unue demandis lian aĝon, kaj la patro siaflanke demandas: „Kiom aĝa li rajtas esti?” Mi komunikas la plej lastan eblan naskiĝdaton. Neniu problemo! La patro malfermas la geedziĝan libron kaj trankvile modifas la naskiĝjaron, adaptante ĝin al la lerneja postulo... Kaj li tute ne komprenas, kiam mi tamen rizufas enskribi la infanon. Laŭ li, ĉio estas en ordo kaj tion li tre sincere kredas. Li tute ne deziras trompi min. Estas ilustraĵo de tiu alia pensmaniero, pri kiu mi jam parolis kaj ankoraŭ ofte parolos. Alia

patro, al kiu mi rifuzis enskribi lian infanon pro lokomanko en iu klaso, klarigante al li ke jam enestas sesdek infanoj kaj ke ili sidas triope sur unu benko, senprobleme reagis: „Mia infano kunportos sian benkon se vi akceptos lin.”

La lernejoj atestoj kaj diplomoj konsistigas alian problemon, ĉar plej ofte ili estis tre lerte falsitaj de specialigitaj homoj.

Principe, mi ne akceptis fotokopiojn, sed sciante ke la infanoj ofte loĝas en ege malfacilaj cirkonstancoj, mi tamen kelkfoje kun granda prudento, ekzamenis la prezentitan dokumenton. Por ilustru tion, jen du veraj travivaĵoj. La unua temas pri fotokopio, la dua pri originala atesto.

Mia kolego de la Jezuita Kolegio - ni tre bone kunlaboris - montris al mi ateston, subskribitan de mi, sed kiun li supozis falsa. Mi atentegis trarigardis ĝin: ja estas mia subskribo, sed la koncerna knabo tute ne sukcese trapasis sian ekzamenon. Pro tio, li klopodis eniri alian lernejon. Finfine, post pluraj horoj da komuna ekzamenado kaj diversaj konjektoj, ni solvis la enigmon: la falsisto uzis du diversajn atestojn: unu por la supra parto kaj aliajn por la malsupra, sur kiu troviĝis mia subskribo, kun dato kiu bedaŭrinde ne rilatis al la donitaĵoj de la supra duono: Li gluis tre precize la du duonojn sur unu folio, fotokopiiis la tuton kaj tiel forrabis al ni valoran tempon. Ni tamen admiris la fakulecon de la falsisto. Domaĝe por la perdita mono de lia kliento!

La dua historio havas alian, eĉ politikan dimension. Mi ricevis peton de du parlamentanoj enskribi iliajn infanojn surbaze de elementlernejaj atestoj. Mi sufiĉe rapide malkovris, ke la nomoj estis ŝanĝitaj, tre bone imititaj, sed tamen temis pri videbla falsigo. Mi do rifuzis la du infanojn. Kelkajn tagojn poste mi ricevis sufiĉe malafablan leteron de la parlamenta prezidanto kiu riproĉis al mi rifuzo de la infanoj de parlamentanaj moŝtoj kaj petis min rekonideri mian decidon.

Mi petis aŭdiencon ĉe la prezidanto, kaj kunvenigis mian direktoron de la elementa lernejo kiel atestanton. Li akceptis nin kaj diris, ke li ne komprenas nian sintenon. Mi klarigis kiel funkcias bona lernejo, kiel mi estis reveninta je la eksplicita peto de la ministro por estri altnivelan lernejon, kion signifas por ni la nocioj objectiveco, egalrajteco de ĉiuj infanoj, kiaj estas niaj kriteriojn por akcepti aŭ rifuzi infanojn surbaze de jam faritaj studoj kaj disponeblaj lokoj, ktp. Dum pli ol unu horo mi tiel faris fakte lecionon kiamaniere funkcias bona lernejo.

Mi rimarkis ke pli kaj pli da ĉeestantoj

kapjesis dum miaj klarigoj progresis. Ili rezultis en unu sola resuma demando: „Jen, sinjoro prezidanto, kiel mi deziras funkciigi mian lernejon cele al la plej granda profito de via lando, kiun ni amas. Sed, ĉu jes aŭ ne estas via deziro ke mi akceptu surbaze de falsaj dokumentoj infanojn de parlamentanoj aŭ aliaj altranguloj, kaj rifuzu surbaze de aŭtentikaj dokumentoj la kapablajn infanojn de laboristoj kaj aliaj malaltranguloj? Mi ŝatas ricevi klaran kaj simplan respondon.”

Longa silento. La kapoj turnas sin unu al la alia, kaj finfine, la prezidanto diras: „Sinjoro direktoro, vi pravas, kaj mi malpravas kiam mi sendis al vi tiun riproĉan leteron. Ni nun klare komprenas, ke vi nur agis por la bono de niaj infanoj kaj de nia lando. Pardonu min, vi neniam plu ricevos intervenon miaflanke.” Ĝenerala aprobo de ĉiuj ĉeestantoj. Tiaj spertoj estis por mi neforgeseblaj, kaj tiel mi iomete kontribuis al ŝanĝo de mensostato, ne adaptita al moderna ŝtato kaj vivmaniero.

Tiu problemo de enskribiĝo de infanoj restos grava problemo, ne nur pro tiuj falsadoj kaj trompoj, sed ankaŭ pro la manko de sidlokoj. Dum la unua jaro, iom post iom, mi malpliigis la nombron de lernantoj en la klasoj ĝis proksimume 40 - kio cetere estas ankoraŭ tro -, sed en tiuj cirkonstancoj mi nepre estis devigata postuli de miaj geinstruistoj pli grandan streĉadon ol kutime.

Ĉi tiuj ne estis nur belgoj, ĉar UNESKO sendis plurajn instruistojn el diversaj partoj de la mondo, i.a. Francio, Haitio, Libano, kiuj relative bone parolis la francan lingvon, ĉar la instruado efektiviĝis en la franca, precipe en la urboj.

Kun la oficialuloj de UNESKO mi havis post unu jaro gravajn diskutojn pro la fakto ke ili preferas „promociitan instruadon”. Tio signifas, ke preskaŭ ĉiuj infanoj devas sukcese kaj antaŭeniri al supera klaso. Mi opiniis, ke tio estas blindiga kaj trompa politiko, kaj mi do preferis resti pli severa kaj garantii altnivelan instruadon, kiu ebligus la plej bonajn gelernantojn eventuale daŭrigi siajn studojn en la nacia aŭ en fremdlanda universitato.

Post iom da tempo, la UNESKO-spertuloj, kiuj ofte havis nenian konon pri la fundamentaj afrikaj problemoj, komprenis ke finfine mia starpunkto ne estis tiom stulta nek malhumana kiom ili komence opiniis. Evoluo havas siajn proprajn leĝojn, kiujn oni ne povas senpune malobservi kaj por kompreni kial tiom da aferoj nuntempe malsukcesas en Afriko, oni nepre konu la mekanismon de vera evoluo.


(daŭrigo en la venonta numero)

Neordinara artista

„Skulptisto” li difinas sin mem, sed tiu ĉi etikedo taŭgas nur por la mallongi-gema telefonlibro. Eĉ „artista” estus troa simpligo koncerne al tiu ĉi vasta-mensa, erudicia personeco. Temas pri Georg Malin, naskiĝinta kaj loĝanta en Mauren, Liĥtenŝtejno, ŝtatesto apud-rejna inter Svislando kaj Aŭstrio. Li naskiĝis en la jaro 1926. Post la gimnazio li studis ĝeneralan historion, arthistorion kaj filozofion. Kvalifi-kigiinte, li dediĉis sin al studado de la praktika arto kaj de la arkeologio. De 1956 li laboraskiel libera artista kaj sciencisto.

Kiel artista li preferas la skulptadon. Lia evoluo en tiu ĉi arta metio bone dokumentiĝas en Liĥtenŝtejno, kie oni lin ofte invitis prizorgi la skulptadon de oficialaj monumentoj, putoj, preĝejaj instalaĵoj kaj simile. Sed ankaŭ eksterlande troviĝas multaj liaj verkaĵoj en publikaj lokoj, muzeoj kaj privataj kolektoj. Specialaĵo lia estas metalaj kubo kun aparte glatigitaj surfacoj. Kompense al la peza laborado per metalo aŭ ŝtono li en la lastaj jaroj ofte pentras akvarelojn, el inter kiuj oni ĵus eldonis elektitajn ekzemplon libroforme.

Kiel sciencisto li publikigis multajn tezojn, traktaĵojn, artikolojn, ktp., precipe pri artaj aŭ arkeologiaj temoj. Sed ankaŭ pri politiko, medio-protektado, kaj religio. Aldone al la krea kaj scienca laboroj li ĉiam engaĝis sin en la socio de sia lando. Neniam artiste mem-sufiĉa, li fondis la Societon por Mediprotektado, estis membro de la supera juĝejo kaj de la liĥtenŝtejna parlamento. Dumtempe li ankaŭ estris la registaran



Metala kubo: la specialaĵo de Georg Malin.

departementon pri kulturo kaj medio. De 1968 li estas konservisto de la liĥtenŝtejna ŝtata artkolekto. Georg Malin dum sia tuta vivo traktis arton, sciencon kaj politikon samrange. Por li kunfandiĝis tiuj sferoj nedisigeble, ĉar por li la mondo estas tutaĵo kaj la diversaj facetoj de la vivo

– inklude la transcendecon – estas interligitaj. Pro tio ankaŭ la malgrandeco de lia lando tute ne limigas lin. Pere de sia arto kaj de sia klereco, li kapablas plifortigi la identecon de la liĥtenŝtejnanoj kaj ligi ilian kulturon al tiu de la ekstera mondo.
Franz-Georg ROSSLER



„Ligi la kulturon de la liĥtenŝtejnanoj al tiu de la ekstera mondo”. Jen skulptisto Georg Malin (meze) kun la registara ĉefo de Liĥtenŝtejno kaj ties edzino.


GERMANIO

Saniĝo per spirita forto

Dum la 50aj jaroj famiĝis en Germanio homo, kiu esperigis milojn da malsanuloj: Bruno Gröning [Grening]. Li faris publikajn prelegojn pri Dio kaj pri la kredo. En ĵurnalo estis legebla: „Lia vorto forigas la malsanon!” Dum tiuj prelegoj homoj saniĝis, lamuloj ekiris, blinduloj ekvidis. Li ne volis havi monon pro tio kaj malakceptis eĉ dankon, ĉar laŭ li nur Dio kapablas sanigi. Sub la premo de la kuracistaro oni malpermesis al li la publikan agon kaj li estis akuzita pri ago kontraŭ la leĝo pri kuracado. Post lia morto en 1959, kiu ĉesigis la proceson, silentiĝis pri li.

Nur dum la lastaj jaroj denove oni aŭdas lian nomon. En Germanio kaj ĉirkaŭaj landoj ekzistas amikaro, kiu ankoraŭ hodiaŭ konservas lian doktrinon, kun 120 lokaj grupoj. Dum iom pli ol unu jaro la nombro de la amikoj duobliĝis al 6500. En eksterlando, kie ne ekzistas grupo, ili letere prizorgas la helposerĉantojn en jenaj lingvoj: germana, angla, franca, hispana, itala, nederlanda, pola, portugala, rusa, rumana, serba, kroata kaj esperanta.

Oni varbas per la vortoj de Bruno Gröning „Ne ekzistas nekuraceblo. La plej granda kuracisto estas Dio.”



La plej grava spirita saniganto en Germanio: Bruno Gröning (1906–1959). Ankaŭ 34 jarojn post lia morto homoj agas laŭ lia doktrino kaj okazas miraklaj saniĝoj.

Li diris krome: „Ne kedu, kion mi diras al vi, sed konvinkiĝu, ĉu tio estas la vero.” Kaj por pruvi, ke vere ne ekzistas nekuraceblo, ekzistas kuracista grupo, kiu atestas la saniĝojn. La bazo estas la diagnozoj de sendependaj kuracistoj el la tempo antaŭ kaj post la saniĝo. El medicina vidpunkto la saniĝoj ne estas klarigeblaj. Ne nur okazas saniĝoj ĉe psikaj aŭ psikosomatikaj malsanoj, sed ankaŭ ĉe nure korpaj.

Bruno Gröning komparis la homon kun baterio. Same kiel malplena baterio ne kapablas funkcii, ankaŭ senenergia korpo ne kapablas plenumi siajn taskojn. La sekvo finfine estas malsano. La amikoj de Bruno Gröning sciigas al la helposerĉantoj enkorpigi tiun sanigan energion, kiun ili nomas saniga kurento. Ateistoj spertante la saniĝojn fariĝas kredantoj. La kredo ludas grandan rolon, ĉar ĝi estas spirita forto. Kredo je la malsano subtenas la malsanon kaj kredo je la saniĝo subtenas la saniĝon. Pro tio estas gravaj la sukcesraportoj atestitaj de kuracistoj, kiuj helpas kredi je la propra saniĝo. Bruno Gröning siatempe ofte citis Jesuon, kiu diris: „Via kredo helpis al vi.”

Kiu interesiĝas pri la spirita saniĝo skribu al Detlef Maier, Marktplatz 8, D-W-6050 Offenbach, Germanio.

Saniĝintoj raportas

Christoph Pesch, 23jara, el Wegberg, suferis denaskan alergion. Ĝi montriĝis kiel atakosimila aeromanko, ternoatakoj, larmantaj okuloj, neeltenebla jukado kun gratiĝado ĝis sangado. Laŭ la kuracistoj saniĝo ne eblis. La faka kuracisto malpermesis al li laktaĵojn, ovojn, la estadon en la arbaro, la kontakton kun floroj, bestoj kaj doma polvo. Ekzistis neniu loko, kie li estis sen perturboj. Post 17 jarojn daŭrinta malsano li saniĝis pere de la doktrino de Bruno Gröning.

Petra Kruse, 32jaraĝa, Lüneburg, suferis drogaĉomanion – longdaŭrajn terapiojn ŝi ne persistis ĝis fino. Krome ŝi suferis hepatiton kun ĉiamaj perturboj de la hepato, depresiojn, senlaborecon. Post la enkorpigo de la saniga kurento ŝi spontanee sentis interna liberiĝo, post kelkaj tagoj ŝi ne plu bezonis vigligaĵojn. Hodiaŭ ŝi jam de kelkaj jaroj estas libera de drogaĉoj kaj laboras ĉe advokato.

Ĉe Elisabeth Winter, 66jaraĝa, Hennef/Sieg, ortopediisto konstatis prolapson de la intervertebraj diskoj. Ŝi

ne kapablis stari sur la dekstra gambo, ĉar ĝi tiam forglitis. Post restado en malsanulejo ŝi devis iri per lamulbastonoj. La kuracistoj prognozis: „Verŝajne vi neniam plu kapablos iri bone.” Post la enkonduko en la doktrinon de Bruno Gröning ŝi baldaŭ komencis iri sen la lamulbastonoj. Detlev MAIER

NI KAJ FI

Emblemo por ateistoj

Memore kaj dediĉe
al Gaston Waringhien

Kristanoj havas krucon, komunistoj havis serpon kaj martelon. Novnazioj, nun pululemaj, nigran svas-tikon. Esperantistoj, iam, la verdan stelon, kaj nun, kelkaj, la melonon (t.e. la jubilean simbolon). Sed ateistoj — kion? Nenion.

Dum turmentilo kaj ekzekutito simbolas kristismon, ateismon simbolo do — nenio. Kaj la simbolo de nenio estas fi (Φ), la 21a litero de l' greka alfabeto.

Sed ne nur tial povus esti fi la emblemo de ateistoj. Krom tio, ke temas pri bildo simpla, facile memorebla kaj unukolore desegnebla, politike neuzita kaj matematike internacia kiel la signoj por plusi kaj minusi, jen pluraj el ĝiaj multaj eblaj signifoj kaj sencoj, fakte homaj konceptoj: 1. Nulo, nenio kaj, ekstreme, nihilismo. 2. Nenio krom la vivo, nenio antaŭnaske nek postmorte. 3. Nenio krom la mondo, la kosmo. 4. Neo (per trastreko) de cirklo, t.e. de alia emblemo. 5. Matematika malo aŭ kompletigo de la konceptoj infinito aŭ senfineco. 6. Modelbildo de la tero kun la luna orbito aŭ de Saturno kun sia ringo; aŭ de la suna sistemo; aŭ de nia galaksio. 7. Modelbildo de atomo hidrogena aŭ alia. 8. Kvankam minuskla, komenco de multaj grekaj vortoj, inter ili, kiel en PIV, „filozofio”. 9. Aludo al la esperanta prefikso „fi-”, kontraste kun la fridpisaj puritaneco, pudoro kaj prudo de multaj religioj kaj eklezioj.

Mi verdire ne tre emas al emblemoj kaj simboloj (la verdan stelon mi de longe ne plu uzas), sed la nun proponatan fi mi volonte surhavis en katolikaj ceremonioj, kiel nuptoj kaj similaj, por montri, ke mi ne hipokritas kaj do ĉeestas invitite, tamen alisente, aliidee, alikrede.

Georgo KAMAĈO

FUTUROLOGIO

Kolekti futurologiajn inventaĵojn

Estas probable, ke la plej granda nombro da hobiistoj en la mondo dediĉas sin al kolektado de objektoj el plej diversaj specoj. Inter tiuj ofte estas antikvaĵoj kaj aliaj raraj kaj multekostaj pecoj kiel helenaj kaj romiaj moneroj, malnovaj ĉinaj ceramikaĵoj, mezepokaj armiloj, unuaj eldonoj de libroj, k.s. Eĉ troviĝas homoj sufiĉe riĉaj, kies hobio estas akiri fruajn modelojn de aŭtomobiloj, kiujn ili restaŭras, por ke ili povu denove ruliĝi sur vojoj.

Kvankam laŭ profesio mi estas arkeologo, ne altiras min malnovaj trezoroj de la antikveco; male, mia atento direktiĝas al la estonteco, al aparatoj kaj procedoj ankoraŭ ne ekzistantaj en la reala mondo de hodiaŭ. Ili estas priskribitaj de imag-riĉaj verkistoj en la literaturo de anticipado, pli bone konata kiel sciencfikcio. Mi kolektas librojn kaj revuojn, en kiuj estas publikigitaj noveloj kaj romanoj, kies rolantoj utiligas elpensitajn inventaĵojn de venontaj tempoj, sisteme klasifas tiun materialon laŭ temoj kaj konservas la dokumentojn en arĥivo por atendi la tagojn, kiam futurologiaj revoj realiĝos. Mi ne scias, ĉu estas ie en la mondo aliaj hobiistoj, kiuj okupiĝas pri kolektado sur la sama tereno. Ĉiokaze, feroca kaj ĵaluza rivaleco ne povas estiĝi inter kolektantoj, ĉar la materialo estas neelĉerpebla.

Sistemigo – Fazo 1

Estas rekomendinde, ke komencantaj kolektantoj de ĉi-specaj fantaziaĵoj laŭsisteme kunmetu sian kolektaĵon, kiu ne povas esti komplete sen almenaŭ unu ekzemplero de ĉiu speco de maŝino aŭ instalaĵo priskribita en SF²-verkoj. Sekve, en fazo 1 oni provu akiri materialon apartenantan al la sekva klasif-skemo: 1) kosmoŝipoj por veturado en la interplaneda kaj interstela spaco; 2) tempomaŝinoj por vojaĝi ambaŭdirekte en la tempo; 3) retrospektivaj aparatoj kaj instalaĵoj por revidi okazintaĵojn en la pasinteco; 4) metodoj por teleporti³ objektojn kaj homojn; 5) procedoj por stimuli artefaritajn sonĝojn; 6) aparatoj por traduki kaj komponi; 7) duplikatoroj de objektoj kaj homoj.

Trakribado de la SF-literaturo rivelas, ke en ĉiu kategorio ekzistas pluraj variaĵoj aŭ modeloj havantaj pli-malpli la saman celon, do oni devas decidi, ĉu pli valoras serĉi la primitivajn, fruajn tipojn, aŭ strebi al

akirado de la plej modernaj, perfektigitaj modeloj.

Specialigo – Fazo 2

Post kiam la baza kolektaĵo estas sufiĉe kompleta, estas eble limigi ĝin al nur unu el la ĉi-supre menciitaj kategorioj, ekzemple tempomaŝinoj aŭ teknikoj de teleportado. Aŭ oni povas kompili katalogon de inventaĵoj troveblaj en la verkoj de nur unu aŭtoro, ekzemple Jules Verne aŭ H.G. Wells. Alia vojo al specialigo estas emfazo sur historia futurologio, t.e. priskribo de objektoj kaj procedoj aperantaj en verkoj de la 19a jc. aŭ pli frue. Ĉiokaze, oni serĉu unikaĵojn, kiujn aliaj kolektantoj ne povas facile trovi. Tre utila ĉi-rilate estas scio de fremdaj lingvoj por legi SF-verkojn ankoraŭ ne vaste tradukitajn. Interesa specialiĝo konsistas el materialo ĉerpita el rakontoj verkitaj originale en Esperanto.

Ĉi-sube mi prezentos du erojn el mia kolektaĵo, ambaŭ venantajn el verkoj publikigitaj en Esperanto.


La kosmoŝipo de inĝ. Losj

Mi tre frue komencis kolekti ekzemplerojn en la unua kategorio, veturilojn por vojaĝado en la spaco. En la esperanta traduko de la fantazia-utopia romano *Aelita aŭ la Marso formortanta* (1928, Horrem bei Köln) la verkisto A. N. Tolstoj rakontas, kiel inĝeniero Matislav Losj konstruis interplanedan spacveturilon en sia propra laborejo en la jaro 1921. La formo de lia dupersona kosmoŝipo estis unika. Kvankam raketoj kaj spacoŝipoj kutime havas longan, cilindroman korpon similan al cigaro aŭ obuso, kun mallarĝa pinta pruo, tiu de la rusa astronauto estis sferforma aŭ, pli precize, ovoforma, alta 8,5 metrojn, larĝa 6 metrojn, kaj kun malakra pinto. La supraĵo estis farita el mola kaj malfacile fandebila ŝtalo, vinktita kaj fortikigita per ripoj.

Sub la ekstera metala tego estis dua ŝelo konsistanta el ses tavoloj de rezino, felto kaj ledo. Interne de tiu dua, lede stabila ,ovo' estis dislokigitaj aparatoj por observado kaj movado, kuŝejoj por instrumentoj kaj nutraĵ-provizo, oksigenujoj kaj cisternoj por ensorbado de karbon-acido. Servis por observado specialaj ,okuloj' – metaltabuletoj kun prismaj lensoj – kiuj eliris el la ekstera tego. La spacoŝipo de tiu inĝeniero kapablis traflugi la distancon de la tero al Marso – 40 000 milionoj da kilometroj – en 9 aŭ 10 horoj.


Sonĝoramo

En pluraj SF-verkoj tre similaj estas aparatoj kaj instalaĵoj en la kvina kategorio pri metodoj celantaj stimulado de artefaritaj sonĝoj. La baza ekipaĵo konsistas el komforta seĝo aŭ fotelo, en kiu sidas la sonĝemulo, kaj kap-tego kun konduktiloj konektitaj al la centra sonĝoproduktanta aparato, sur kiu estas regilarpanelo por programi sonĝojn. Pli ol unu sonĝonto havas la impreson, ke li sidas en elektroekzekuta seĝo. „Vojaĝo tra la dimensioj” estas sciencfikcia novelaro originale verkita en Esperanto (Osako, 1969) de Konisi Gaku, kiu rakontas en „Sonĝoramo”, kiel esploristo en speciala esplora laboratorio de elektroteknika kompanio prilaboris la principojn de Plano Sonĝo. Estas sciante, ke la homo kutimas sonĝi dum dormado, kaj laŭ la naturo de la sonĝoj dependas lia



Scienc-fikcio: skizo de spacŝipo, publikigita en Francio dum la regno de Napoleono.

humoro post vekigo. Bela aŭ plezura sonĝo rezultigas serenan etoson la sekvan tagon; kontraŭe, korprema, terura sonĝo disrompas trankvilon dumnokte aŭ difektas la morgaŭan humoron. Se oni povus anticipi elekti sonĝon laŭ sia plaĉo, la vivo fariĝus multe pli agrabla. Plano Sonĝo faciligas elekton de sonĝoj laŭvole, kiel muziko per gramofondisko. Kiam la esploristo mem sidis en kusenita sofo kun surkape kaskoforma aparato ligita per ŝnurkonduktiloj al la regad-aparato, ĝi estis ŝaltita, kaj delikata vibrado komencis tikli la kapon de la sonĝonto, baldaŭ kondukante lin al agrabla dormado. La dormanto ne konsciis pri la tempodaŭro de la artefarite stimulita sonĝo, sed post vekigo lia kapo estis serena kaj li kapablis memori detalojn de la sonĝo. La elektroteknika kompanio reklamis la aparaton per la nomo 'Sonĝoramo', kaj sonĝoram-programoj sur magnetizitaj bendoj havis bonan debiton en la grandurbaj magazenoj. Por progresigi la teknikon de la sonĝoramo, estis proponita la telesonĝo. Ĉiunokte sonĝostacioj mikroonde dissendis sonĝoprogramojn pri melodramoj, varietoj, enigmoj kaj eĉ reklamoj. La telesonĝojn oni akiris per sonĝoriceviloj. Ili fariĝis maniero regi la pensojn de sonĝantoj, ĉar la dissendataj ondoj havis specialan frekvenc-spektron, kiu



Ilustraĵo el scienc-fikcia publikaĵo. La rapidega scienca kaj teknika evoluo igis multajn aŭgurojn de Jules Verne kaj Arthur C. Clarke realaj.

postulis difinitan subkonscion en la cerboĉeloj de la ricevantoj.

Kreiva aspekto

Oni ne estu simple pasiva kolektanto, provante akumuli grandan amason da elpensitaj objektoj. Oni atente ekzameni ĉiun aparaton kaj procedon por detekti difektojn kaj limigojn kun la celo serĉi manierojn modifi ilin per pliperfektigita konstrutekniko aŭ eĉ per aldono de novaj elementoj, ebligantaj pli efikan funkciadon. La plej granda plezuro de entuziasma kolektanto estas trovi, ke mankas en lia „futurologia deponejo” maŝinoj aŭ instalaĵoj, kiujn SF-aŭtoroj preteratentis, sed kiuj tamen estas nepre bezonataj. Tiam la vojo estas libera uzi imagpovon por eltrovi novajn kaj originalajn kreaĵojn. Ĝuste tiun procedon mi sekvis, kiam en unu el miaj noveloj estis bezonata rimedo por veturigi kvar homojn al la palaco de faraono Tutanĥamon en la antikva Egipto. Ne taŭgis la primitiva unupersona kap-bendo de fizikisto-matematikisto Viktor Arkadjeviĉ, kies ekskurso pasintecen estis limigita al nur kelkaj monatoj, nek la unusida tempomaŝino de H.G. Wells, do mi planis kaj „konstruis” la kronoskafon, kvarsidan transtempnan veturilon, kapablan transporti tempovojaĝantojn senlime en ambaŭ direktoj.

Valoro de la hobia

Ne senkiale sciencfikcia literaturo estas konata ankaŭ kiel literaturo de anticipado, ĉar unu el la celoj de la SF-ĝenro estas prognozado de la naturo de la estonteco. Estas facile demonstri, ke tio okazis en la verkoj de pluraj aŭtoroj de la pasintaj jardekoj kaj jarcentoj. Ekzemple, en la

romanoj de Jules Verne estis anticipitaj ne malpli ol kvardeko da teknikaj aparatoj kaj teknologiaj procedoj inter kiuj estas: artefaritaj satelitoj, televizio, klimatizado, antaŭfabrikitaj loĝejoj, telekso, sonfilmoj, helikopteroj, lasero, komputiloj, mitraloj kaj atombomboj. Hugo Gernsback, kiu pioniris en la SF-literaturo en Usono, en sia libro *Ralph 124 C 41+*, eldonita en 1911, anticipis inter aliaj novaĵoj radaron pli ol kvaronjarcenton antaŭ ol ĝi fariĝis ĉiutagaĵo. En *La dormanto vekigas*, publikigita en 1899, H.G. Wells priskribis la vekigon de viro post 200 jaroj, kiam en la mondo jam okazis granda teknika progreso. La tradukinto de la esperanta versio, kiu aperis en 1929, reliefigis, ke en la intervenaj tri jardekoj pluraj el tiuj futurologiaj anticipaĵoj estis realigitaj.

Ankoraŭ ne estis inventitaj metodoj de tempovojaĝado, teleportado kaj retrospektiva prezentado de historiaj eventoj, sed tio ne malhelpas ke rolantoj en SF-verkoj teorie priskribu kaj uzu ilin. Kiuj mokas homojn, okupiĝantajn pri tiuj aspektoj de la futurologio, kaj kiuj estas skeptikaj pri la efektivigo de anticipita inventaĵo, fariĝu pli sobre toleremaj, legante jenajn saĝajn vortojn de Jules Verne: „Ĉio, kion unu homo kapablas imagi, aliaj homoj ĝin realigos.” Bernard GOLDEN

1. futurologio: esploro aŭ reserĉo pri la futuro; scienco okupiĝanta pri la induktado de situacioj atendeblaj en la estonteco.
2. SF: sciencfikcio.
3. teleportado: metodo transporti objektojn kaj homojn je grandaj distancoj, kaj ankaŭ transporti sin mem per la povo de la penso.



La renoma serio SFEROJ: unu el la plej bonaj eroj de la scienc-fikcia ĝenro en Esperanto.

NE TENU GEMON KAJ MONON KIEL PLEJ ALTAN VALORON			MINERALON JARFINA SENTO DE LEGANTO	K	AKVIJON OPNAM AJON	F I	FEMALE MAL GRANDA SVELAJ	T	MALĈASTA SKRIBAJ AROMARBA	P T	SUPER- FLUJ VERBA FRAJO			
			KVARRADA VETURILO	A	B	O	N	H	U	M	O	R	O	
DENOVA ELEKT'	FORTA IMPRESO	BESTI ORNAMAJE ARAB	K	O	R	N	E	SURPRIZ- IGOS AGOJ	M	I	R	O	S	
R	E	B	A	L	O	T	FAJRIJAJ	F	O	R	N	A	NE TRE GRANDA UTILO	
M	F	E	L	I	Ĉ	O	PENTR- AJOJN KAJ TEATR- AJOJN	A	R	T	O	J	N	
PARADIZON	E	D	E	N	O	N	RESPOND' AKVOVOJO	R	E	A	G	KORTIBRO'	E	
MAJSTARON	K	U	Ŝ	O	N	SUM BIRMORNA	K	O	T	RESIAS SUR SEĜO	R	A	B	
TRINKAJOJN	T	E	O	N	FLEKSAS LA GENUOJN	K	A	J	M	S	A	N	O	
M	O	N	ENDANGER- IGIS	AMFIBI'	R	A	N	MALSAN- ECAN BRULO	T	I	F	A	N	
PAGIL'	PREP. POR ANTAU- TEMPECO	MOVAS SIN MALANIMEN RABO BESTOJN	R	E	I	R	A	S	MALKUNE HU LITER	D	I	S	E	
M	P	L	I	SUM	V	A	L	O	R	A	S	KOMPOST- MAŝINON	G	
DANGER- INKLINON	R	I	S	K	E	M	O	N	SUB RAJU ANTO	S	E	L	O	
R	A	N	K	O	R	E	SATAS HUNDO	I	M	PRON 1000 (ROMIE)	M	I	ŜRMILO	
MAL- PARDON- EME	BLUZ INAN ORGANON	K	I	T	E	L	O	L	BONODORA ARBED'	M	O	N	O	
L	U	O	S	FERORROJ FINVORTO	N	A	S	O	J	DISTINGL' RESTAJE	N	O	M	
PRUNTOS	T	J	REMIA SOLVIL	A	C	E	T	ENMETO	KOLEKTAJ	A	R	VIRKAPRO	T	B
R	E	N	LAKTUJ	M	A	N	O	MOV' MAL SUPREN	S	U	B	I	R	
ORGAN'	R	SICILIA URB SUBJUNK CIO	M	E	S	I	N	MALBON VIDE	M	I	O	P	E	
PEN TEMPAJ FLOROJ	O	K	A	N	L	P.	G	SPICAJ	F	E	N	K	O	L
A	N	E	M	O	N	O	J	GASO	N	E	O	N	O	

Solvoj de la enigmoj de MONATO 1993/3.

Ĉelara enigmo

O	T	S	T	F	L	
P	1	U	2	O	3	A
I	L	R	B	R	G	
C	4	A	5	O	6	E
S	O	L	V	O	N	
A	7	A	8	U	9	I
L	T	K	L	D	G	
O	10	O	11	A	12	R
D	A	N	Ŭ	N	E	

Angulenigmo

	1	2	3	4	5	6	7	8
1	K	A	P	O	R	A	L	O
2	A	B	O	M	E	N	A	
3	P	O	L	E	N	O		
4	O	M	E	G	A			
5	R	E	N	A				
6	A	N	O					
7	L	A						
8	O							

Solvo de januara enigmo

Gajnintoj de la januara konkurso

De la 29 ĝustaj alvenintaj respondoj 5 gajnis libropremion: 1. M. Borguet, Belgio; 2. G. Wilsdorf, Germanio; 3. E.M. Tilanus-Tepas, Nederlando; 4. F. Vazjari, Albanio; 5. B. Legeay, Francio. Gratulojn!

Diamanto de 2 al 8 ĉeloj

		1	G					
	2	P	A	3	S			
	4	T	I	Z	A	5	N	
6	R	I	V	E	L	U	7	S
8	E	R	O	T	I	K	E	
	9	A	T	A	K	O		
		10	O	R	O			
			O					

NOVAN ENIGMON KUN PREMIO VI TROVOS EN LA VENONTA NUMERO DE NIA REVUO.

KUR	ES RA T	F T
1	2	3
E14%Z	KKK _{LOR}	F ^D R ^E S ^C
4	5	6
Ni laboro paŝo paŝo atingos glolacelonro. Z.		IGAMUZAJMOJ
	7	8

1. Esperanto sen peno
2. Nigra-blanka foto
3. Trikoloreto
4. Preseraro
5. Kurĉevalo
6. Dekkvar Procento Interezo
7. Ni paŝo post paŝo post longa laboro, atingos la celon en gloro.
8. Amuzaj Enigmoj de Klivo

Klivo Lendono, Kanado

Kiel titoli sukcesajn verkojn?

Nu, ekzemple tiel kiel ni ĵus faris... Sed, serioze: ĉu vi ofte ŝovis en vian aĉetkorbon la *Ilustritan determinlibron pri la likenoj de Okcidenta Eŭropo*? Mi vetas ke ne. Ĉu vi kutimas endormiĝi kun la *Parolado okaze de la Stata Akto por la Tago de la germana unueco en la Berlina Filharmonio la 3an de oktobro 1990 de Richard von Weizsäcker* [Riĥart fon Vájcek] (trad. R. Haupenthal [Háüpnthal])? Mi timas ke ne. Ankaŭ *Kontraŭdiroj de la Plena Analiza Gramatiko al la Fundamenta Gramatiko* kuŝas ne sub via kuseno, sed sub polvokovro, longvice, sur la bretaroj de niaj libroservoj. En ĉio tio nia SEKSEPIL (Scienca Esplorgrupo pri Komerca Sukceso de Esperantaj Periodaĵoj kaj Literaturaĵoj) vidas konfirmon de eterna leĝo: libro sen trafa titolo ne bone vendiĝas. La leguntoj elĉerpiĝas pli frue ol la verko.

Male, fraptitoloj el plumaĵoj kiel *Insulo de krevoj*, *Gurda reaperis*, *Gambora fiki* aŭ *Pigre pasas la rukto* freneze disfuras en la borse hektika mondo de la Esperanto libromerkato. Kelkaj el ili finvendiĝas dum malpli longa tempo ol la averaĝa vivodaŭro de du tri UEA-estraranoj!

Konvinkite ke bona titolo estas duona sukceso, ni efektivigis statistikan esploron pri la lastjaraj furorlistoj de la UEA-Libro servo. Ni ambiciis difini kiaj (kaj malkiaj) titoloj altiras plej magnete la avidan klientaron. Ni ŝparas al vi detalan priskribon de nia metodo. Sufiĉu diri ke ni procedis laŭvorte laŭ-vorte. Nome, ni konstatis ke iuj vortoj aperas relative ofte en la titoloj de grand-debitaj verkoj, dum aliaj ŝajnas komplete ekzilitaj. (Ekzemple: ĉu vi imagus ke nek *ekimozo* nek *eskimozo* troviĝas en la sukcesa supra?) Tial ni nombris la aperojn de ĉiu vorto kiel titol-ero.

La zorga esploro montris ke oni plej probable atingas sukceson enŝovante en la titolon la vorton... *Esperanto*. Kalkan-trete sekvas ĉi tiun nobelulon la proletoj de nia vorttrezoro: *la kaj de*. Post la atendebla *lingvo*, obstine reaperas: *Esperanta*. Sese kaj sepe, *plena* kaj *saluto* superas, interalie, la gemojn *gramatiko*, *Gerda*, *danĝera*, *movado*, kaj *malaperis*. (Pliajn detalojn vidu en ampleksa studo, pro deontologiaj kaŭzoj sentitola.) Kroma celo de nia esploro estis identigi la potenciale plej sukcesajn Esperantajn librotitolojn; tiujn kies ek-

vido impulsas la sekreciaron, perturbas la digeston, briligas okulvitrojn kaj malfermas monujojn. Ni filantropie malkaŝas parton de la rezulto, des pli ke temas pri libroj ankoraŭ neverkitaĵoj... sed, ni esperas, verkotaj. La absoluta ĉampiono nomiĝas: *La plena Esperanta lingvo de Esperanto*.

Jen verko por kiu necesas vasta vido, akra intelekto kaj malpaneema tekstprilaborilo! Ĝia apero ebligus al ni, povraj sensciuloj, trovi la stretan padon de ĝusto inter la faŭkantaj abismoj de Esperantaloj, mal-Esperantoj kaj Desperantoj, kiujn kultivas subfosantoj de nia orfa idiomo!

Por malpli altpretendendaj, tamen sukcesemaj aŭtoroj ni rekomendas, je la dua loko, la intrigoplenan detektivaĵon *Saluton! Malaperis danĝera analiza gramatiko kaj Gerda*.

Listo de pluaj titoloj, kun la kutima triona rabato (kaj aldona imposto por anoj de la Eŭropa Komunumo) mendumu de:

SEKSEPIL

ĉe: Rita Sventl kaj Stepan Goldenov, Biblioteko Hodler, Breto 103/24 c.

Rita Sventl kaj Stepan Goldenov, kompreneble estas István Ertl, p/a UEA.

Rita Sventl kaj Stepan Goldenov, same kompreneble, estas pseŭdonimoj pro timo ke la aŭtoro perdos sian laborlokon en grava libro servo de eĉ pli grava asocio Esperanta. Ĉiuj legantoj komprenos ke MONATO akceptas tiun uzon de pseŭdonimo en nia epoko de malfacile troveblaj laborpostenoj.

Tamen Esperanto-mono?

Antaŭ kelka tempo furoris en Germanio kaj aliaj landoj de Eŭropa Komunumo (EK) la denunco de bavara dekstrula ministro Peter Gauweiler [Gaŭvajler], kiu publike protestis kontraŭ forigo de germana marko kaj malŝate nomis la EK-monunuon ekue „Esperanto-mono”. Ne malmultaj germanaj esperantistoj koleris pri kaj pro tio.

Sed nun alia germana propono eble povas konsoli furiozajn esperantistojn: la renoma *Gesellschaft für deutsche Sprache (GfdS)* (Asocio por germana lingvo), pledas por la nomocent, kiun ricevu la centona monero de ekue. GfdS-ĵurio elektis el pli ol 3000 proponoj, kiuj alvenis je konkurso, la vorton cent pro tio, ke ĝi ne nur havas la avantaĝon, ke cent-moneroj ekzistas jam en pluraj landoj, sed ankaŭ ĉar ĝi estas la Esperanto-vorto por 100 kaj komuna eŭropa vorto.

Rimarkinde, ke germana lingvo-institucio do emfazas la Esperanto-karakteron de tiu ĉi vorto. GfdS, cetere, ne kredas ke oni akceptos ĝenerale la terminon ekue; ĝi argumentas ke ties oficiala nomo ECU kaŭzas prononcproblemojn.

Ĉu do eble la Esperanto-movado faru novan proponon, fakte ja malnovan: kial ne elekti la nomon stelo, kiun portis la monunuo de la Universala Ligo? Aŭ ĉu iu aŭdas prononcproblemon? Kiel ajn, oni vidas ke spite al ĉiuj kontraŭaj asertoj Esperanto estas avangarda lingvo.

Stefan MAUL



anoncetoj

Ĉu vi havas modemon? FEL serĉas kelkajn personojn, prefere en Belgio aŭ ĉirkaŭaĵo, kiuj posedas modemon (kaj komputilon!) kaj pretas fari kelkajn mallongajn testojn. Skribu al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

Filio de Pola Esperanto-Asocio en Olsztyn organizas en la tagoj 25-27an de junio 1993j. Esperantan semajnfino kadre de Jubileaj Tagoj de Olsztyn, titolitaj „Ni serĉas kontaktojn kun la unuiĝanta Eŭropo”. La programo konsistas el: vizitado de la urbo, interkona vespero, prelegoj kaj konkursoj. Loĝado ĉe esperantistoj aŭ en hoteloj (laŭ deziro kaj ebleco de la lokaj esperantistoj). Kore akceptataj estas esperantistoj povantaj prezenti interesan prelegon. Detalajn informojn donas kaj aliĝilojn akceptas (ĝis la 1-a de majo de 1993j.): Esperanto-Filio, pk.420, 10-900 Olsztyn 2, Pollando. Venu al Olsztyn, la ĉefurbo de regiono Varmio kaj Mazurio, konata pro la belaj lagoj kaj arbaroj.

Ni havas sepjaran filinon kaj kvinjaran filon kaj serĉas kontakton al samtipa familio (ne nepre tutesperantista) en suda Anglio. Bonvolu skribi al familio Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien.

ICEM-ESPERANTO (Kooperala Instituto de la Moderna Lernejo Freinet-pedagogio) invitas vin partopreni en sia renkonto en Pardubice, Ĉeĥio, de la 14a ĝis la 23a de julio 1993. Petu pliajn informojn kaj aliĝilon: interesuloj de eks socialistaj landoj al Jarmila Ryznarová, na okrouhliku 953/21, 53003 Pardubice, Ĉeĥio; aliaj landoj al Daniel David, 44, rue de Lens, F-59190 Hazebrouck, Francio.


Partoprenu Esperanto-Somerlernejon en Anglio inter la 7a kaj 13a de aŭgusto 1993! Detaloj haveblas de: The Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Britio, ST12 9DG.

Lernolibro de fiziko en Esperanto estas verkata. Kunlaborantoj bonvenaj. Inf. Matti Lahtinen, Sippolankartano F3, SF-62375 Ylihärmä, Finnlando.

La privata komerc-turisma firmao MARRAN (Moskvo, Ruslando) interesiĝas pri negoco de diversaj konsumvaroj el via lando. Oni pretas pagi per dolaroj aŭ aranĝi reciproke profitan barterkomercon, komunan produktadon. **Plej gravas kvalito, nivelo de prezoj kaj rapideco de liveraĵoj.** Oni havas eblecon loĝigi grupojn da turistoj en unuaklasaj aŭ en apudurbaj pli malmultekostaj hoteloj kaj garantias vizitojn al ĉiuj vidindaĵoj kun gvidistoj esperante kaj en iu nacia lingvo parolantaj; do temas ne nur pri esperantistoj. Demandoj kaj proponoj estas bonvenaj laŭ nia tel/fax (007) (095) 928-8049 Maran Stepanov (Esperante, angle, ruse).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 40 belgaj frankoj* (BEF) por unu linio (minimуме 240 BEF*). Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

*Por Eŭropa Komunumo + 19,5 % AVI.



Tiuj ĉi kaj multaj aliaj belaspektaj brakhorloĝoj estas haveblaj ĉe FEL aŭ rekte ĉe la importisto, Flory Witdoeck, Witte Nonnenstraat 9A, B-8400 Oostende. Prezo de la dekstra horloĝo 1700 BEF, de la maldekstra 1267 BEF (ambaŭ inkluzive imposton sed ekskluzive afrankon).

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Ideala loko por esperantumi, studadi, feriadi aŭ simple interrompi la vojaĝon por tranokti. Petu nian ĝeneralan programon '93.

KCE, Poŝtfako 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, ☎ (039) 26 74 07.

LA GAZETO

mondkultura
sendependa
esperantisma

PETU PROVNUMERON ĈE:
LA GAZETO
55210 CREUE, FRANCO

ESPERANTO-KONFERENCO EN HUNGARIO KONDOROS

17-24 julio 1993



TEMO

Kial paroli Esperanton?

PROGRAMO

*prelegoj, debatoj, kursoj,
Osiek-premio, simpozioj,
teatraĵoj, distroj, libroservo*

24-27 julio 1993


tri tagoj en Budapeŝto

Informoj, aliĝoj:

*Eric Laubacher
1, rue des Vosges
F-78180*

*Montigny-le-Bretonneux
Francio*


tel.: (1) 30 96 67 91



Krys Ungar kaj Emile Van Damme, du novaj talentoj en la poezia firmamento, prezentas al vi faskon da poemoj pri hodiaŭaj temoj: jen humuraj, jen pensigaj, jen malgajaj. William Auld ne hezitis citi Ungar kaj Van Damme inter la plej elstaraj poetoj nunaj.

*Krys Ungar: Meznokto metropola. 360 BEF + afranko.
Emile Van Damme: Dolçe amare. 240 BEF + afranko*

Mendu la librojn ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, aŭ ĉe via kutima libroservo.



"Stafeto"-serio prezentas

Vojaĝoj

kaj aliaj poemoj

Edwin de Kock

Poezie turismi en Eŭropo, ĉu antikva, ĉu nova. Festi la centjariĝon de Esperanto. Ĝue pripensi dum momento da silento... Jen la eblecoj, kiam vi legos la poemaron de nia sud-afrika poeto.

Ne timu... Notoj kaj vortlisto helpas vin tra malfacilaj partoj. La poeton mem vi povas ekkoni legante liajn biografiajn notojn. Tiu ĉi poemaro vere malfermas poezion al ĉiuj. Modele!

Vojaĝoj kaj aliaj poemoj. 148 p., 390 BEC + sendokostoj, bindita. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Esperanto = Interlingvo?

JES!

Ĉar nun ekzistas la

HUNGARA LINGVOKURSO


Enkonduko kaj kurso pri tiu finn-ugra lingvo, kun multaj klarigoj, tekstoj ekzercoj kaj plena vortlisto.

Mendu ĝin ĉe FEL (810 Belgaj frankoj + afranko) aŭ ĉe via kutima libroservo.

Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de **MONATO** en

praktika plasta kolektilo!

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Prezo 360 BEF (inkl. afrankon). Se vi mendas 2 ekzemplerojn, vi ricevos trian senpage!